HUNGARA VIVO

3
1975
8,–Ft



VINEKONOMIAJ ENTREPRENOJ VINKELMASTRUMOJ

BORGAZDASÁGI VÁLLALATOK
PINCEGAZDASÁGOK

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro 1975. 3-a numero

Numero pri la Esperanta gazetaro

ENHAVO

M. Gergely: Faktoj kaj ebloj de nia gazetaro 1
Enketo de redaktoroj: prof. d-ro B. Popoviĉ, D, Blanke, G. Silfer 3
K. Kalocsay: Kelko pri la starto de Literaturo Mondo 5
Hungara Vivo — kiel la Legantoj ĝin taksas 6
V. Benczik: Pasinto kaj estonto 8
I. Pákolitz: Sireno — Tr. M. Fejes 9
Gyula Virizlay: La laboristoj kaj la lingvostudado 10
Attila József: Poemoj — Tr. K. Kalocsay 11
I. Csurka: Ŝakretisto — Tr. B. Wacha 12
Aldo de Giorgi: Viaj manoj . . 13
L. Lesznai: Vivo por Bartók . . 14
Ervin Fenyvesi: Elstara patrioto Mihály Károlyi 15
Sz Bálint: Panoramo 16
D-ro Ferenc László: Konstanta Danub-ekspozicio 18
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj 25
William Auld: Rossetti — „fajra forto" 26
V. Benczik: Diamanta Libro de la Esperanta-Movado 29
Michelangelo Buonarotti: Soneto — Tr. L. Tárkony 30
K. Kalocsay: Lingvo kaj logiko 30
FERI: Krucenigmo 31
Ekzameno sen risko 31
Korespondi deziras — Humuro . 32

Sur la titolpaĝo: muntaĵo — Foto de Zoltán Fejér

Faktoj kaj ebloj de nia gazetaro

„Ĉu mortis aŭ dormas la konscio de la esperantistaro? — Vole ne vole ni demandas nin, kaj tiu ĉi demando koncipiĝis en malespera doloro, en kiu baraktas *senpove, kvankam plenenergie*, nia konscia destino kaj neestingebla amo al la lingvo, al la movado. Legante la ĉefajn presorganojn »Esperanto« kaj »Heroldo de Esperanto«, ĉie oni trovas saman plendon, senesperan helpkrion kaj vidante nian propran situacion ni devas konstati, ke ia nova krizo minacas la vivkapablon, sanan evoluon de nia kulturo Esperanto . . .

La nombro de niaj abonantoj neniam superis la *500*. El la centmiloj nur kvincent! Vere heroa sinofero, fanatika fido al estonto, neestingebla amo al la lingvo kaj ideo povis teni plumon en niaj manoj. Nur kvincent troviĝas en la centmiloj, kiuj konscias pri signifo de la literatura lingvo kaj originala kulturo . . . de Esperanto? Ĉu vere nur kvincent?

Ni ne volas kredi tion! Ni ne volas perdi fidon pri la estonto de nia pionira laboro. Lastfoje ni turnas nun kun helpkria petego al la tutmonda esperantistaro: ekzistrajton kaj kompreneman subtenon al . . ."

Mi citis longe, sed mi suspektas, ke multaj el la legantoj ne divenis, kiam kaj kie aperis ĉi tiu animkapta helpkrio? . . . Nu: en tiu literatura revuo, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas fenomeno, legendo en Esperantujo: en Literatura Mondo, januaro 1926 (Kvara jaro, no. 11.) En tiu revuo, kies spirita gvidanto estis Kolomano Kalocsay. Kaj la supran, ne unuan helpkrion verkis Julio Baghy.

Sed estas vero, oni povas citi similajn helpkriojn el iuj ajn revuoj de Esperantujo inter la du mondmilitoj, eĉ: el pluraj revuoj de nia hodiaŭa gazetaro. Kaj ĉi tiu fakto estas eĉ pli animskua, malesperiga.

Tial mi opinias, ke oni devas analizi tute sincere la problemojn de nia gazetaro. Estas ĝenerale konate, ke la propagando, eĉ la plej efika formo de la propagando, la gazeto, revuo estas eble la plej grava ilo de iu ajn movado, ĉefe de tiuj, kiuj ankoraŭ devas lukti por sia ekzistado kaj akcepto. Mi esperas, ke ankaŭ la esperantistoj scias ĉi tiun simplan veron, sed tiam metiĝas la demando: kial ne speguliĝas tiu baza kono en la gazetaro de Esperantujo?

Do: kiaj trajtoj karakterizas nian hodiaŭan gazetaron? Laŭ miaj spertoj (kiujn mi povis kolekti kiel redaktoro de Hungara Vivo dum 7 jaroj kaj kiel redaktoro de Eszperantó Magazin dum 2 jaroj) la sekvantaj:

1. La amatoreco estas la unua, la plej paraliza trajto, kaj el tiu devenas la ceteraj.

2. Niaj gazetoj — eble sen escepto — en sia formo, papero, tipografio, ktp. estas malriĉaj, pli ĝuste: kompatindaj. En la jarlibro 1974 de UEA oni trovas la titolon kaj adreson de 104 esperantaj gazetoj, sed kompare kun la nuntempaj naciaj gazetoj kaj revuoj la rezulto estas hontinda. La plej multaj redaktoroj kaj aliaj aktivuloj laboras entuziasme por nia afero, sed la redaktado kaj la eldono por ili estas nur estiminda hobio, ne profesio. Kaj la rezulto? . . . Oni ne kapablas trovi tiujn rimedojn, financajn kaj spiritajn, objektivajn kaj subjektivajn kondiĉojn, sen kiuj hodiaŭ oni, ankaŭ la esperantistoj, ne povas aperigi taŭgajn gazetojn.

3. La plej multaj gazetoj vere estas nur simpla movada, eĉ klubnivela informilo, do ili ne nomeblas gazetoj, revuoj.

Eldonaĵoj de Hungara Esperanto Asocio

4. Niaj gazetoj ne konas la ĝeneralan kutimon, ke la aŭtoro de valora artikolo havas rajton je honorario.

5. Mankas la necesa kolegeca kunlaboro inter la esperantaj gazetoj. Ĉe Hungara Vivo ni spertadis, ke amase venas ĉiutage petoj, anoncoj de aliaj gazetoj, landaj asocioj kaj kluboj, ke ni aperigu ĉi tion, sed kiam ni proponis letere reciprokan kunlaboron al redakcioj, ties akcepto forrestis. Kiel niaj abonantoj povas sperti, en Hungara Vivo ekde 1969 en ĉiuj numeroj legeblas tutpaĝa rubriko de Lajos Tárkony, la eminenta poeto kaj eseisto: Revuo de Revuoj. Kial? Ĉu eble nia redakcio ne havas sufiĉajn manuskriptojn? Tute ne; ĉe la fina fazo de la preparo de niaj numeroj la plej peza demando por la redaktoro estas, kiujn artikolojn li povas ellasi por la sekvontaj numeroj. Simple tial ni aperigadas la rubrikon Revuo de Revuoj, ĉar la redakcio sentas deva, eĉ deca informi siajn legantojn pri ĉiuj interesaĵoj, do ankaŭ pri la plej gravaj artikoloj de *la aliaj esperantaj* revuoj. Kaj ni ne ellasos la ŝatatan rubrikon, kvankam niaj fratgazetoj ne rekompencas ĉi tiun komprenindan geston.

6. Tute mankas la necesega akordigo el la esperanta gazetaro, ĉar ankaŭ UEA ne scias, kiel li devas agi por sia plej grava propagandilo, por nia gazetaro, aŭ ne kapablas por tio fari eĉ la plej urĝajn paŝojn.

Kio estas la resumo?

Mi bone scias, ke analizi proprajn erarojn, propran mankhavecon estas tre-tre malfacile, sed paroli pri ĉi tiu inda temo ne eblas sen plena sincero kaj kuraĝo.

Laŭ mi la nuntempa esperanta gazetaro ne taŭgas servi nian konstantan modernan ideon, ne kapablas batali sukcese por niaj celoj. Hodiaŭ jam estas evidente, ke pli kaj pli rapide kreskas la kontaktoj inter la landoj, inter la diversaj sciencaj fakoj, inter ĉiuj terenoj de nia epoko. Do paralele kun la kreskantaj kontaktoj pligrandiĝas la lingvaj problemoj. Oni devas rekoni, ke la tempo laboras por nia afero, por la Esperanta lingvo kaj movado. Tial pli urĝas ol iam ajn, ke la esperanta movado kaj esperantaj gazetoj kapablu eluzi la hodiaŭajn pli bonajn cirkonstancojn por nia celo.

Estis ĝojinde, ke la estro de UEA pasintjare plijuniĝis, sed oni devas daŭrigi la unuan paŝon. Estus tre grava rezulto, se ni sukcesus plifortigi nian gazetaron.

Mi kuraĝas proponi kelkajn rimedojn por la pli bona solvo.

1. Oni devas estigi aŭ el la ekzistantaj gazetoj plifortigi 8—10 revuojn, kiuj kapablas kompetente informi la legantojn pri 8—10 speciaj terenoj, fakoj. Kion ni povas ja diri nun al la simpatiuloj aŭ komencantaj esperantistoj, kial do ili lernu nian lingvon? Ekzemple: kiajn fakrevuojn, librojn, vortarojn, ktp. ili povas uzi regule kiel nemalhaveblajn fontojn por ilia okupiĝo? Tial necesas urĝe similaj al Homo kaj Kosmo, Scienca Revuo, la iama Literatura Mondo, kelkaj specialaj revuoj abonotaj de esperantistoj kaj simpatiuloj, apogotaj de UEA mem kaj de la landaj asocioj.

2. La spertoj de Eszperantó Magazin, aperanta ekde oktobro de 1973 en Budapeŝto, konvinkis nin, ke *krom la informado de la esperantistoj estas almenaŭ tiom grave informi la neesperantistojn pri nia afero, pri la multlingveco de nia epoko, kaj la ebloj de la solvo, pri Esperanto.* Sufiĉis por tio 20 monatoj, ke ni atingu tian nivelon, ke en la Eszperantó Magazin oni povas ricevi interesajn artikolojn de reputaciaj aŭtoroj, sciencistoj, verkistoj, altrangaj gvidantoj, parlamentaj deputitoj. Sendube ili ne donus intervjuojn, artikolojn, se Eszperantó Magazin ne kapablus atingi kaj gardi tian nivelon, kiel la naciaj revuoj. La EM publikigis — ekzemple — la tre gravan intervjuon kun Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la Hungaraj Sindikatoj, kaj artikolon de lia kunlaboranto, kultursekretario de Gyula Virizlay (La laboristoj kaj la lingvostudado), kaj ni aperigis la gravan iniciaton de Géza Bárczi, akademiano, nia plej eminenta lingvoscienculo, ke la Budapeŝta Universitato provu organizi malgrandan internacian konferencon de esperantaj kaj neesperantaj lingvistoj por diskuti la problemon kaj la solvon de la multlingveco.

3. En ĉiu dua aŭ tria jaro necesas aranĝi konferencon de la esperantaj redaktoroj, eble en la kadro de la Universala Kongreso de Esperanto. La mondkongreso ĉiujara estas vere utila kaj grava evento, sed laŭ mi por nia afero hodiaŭ estas grava ankaŭ la situacio kaj la problemaro de nia gazetaro. Sen taŭga ilo neniu movado kapablas eluzi bone la eblaĵojn, atingi sian celon. Ĉi tiu vero estas nuntempe ankoraŭ pli evidenta, kiel mi jam diris.

4. Nia movado devas kaj bezonas serĉi kaj trovi 10—20 specialistojn, redaktorojn, kiuj scias, kiel oni devas kaj povas redakti bonkvalitajn revuojn. Nekredeble, ke ne troviĝus en nia rondo ĉiulande 2—3 kompetentuloj. Laŭ mia opinio hodiaŭ nia movado ne povas atingi gravan sukceson per la malnovaj rimedoj, tial necesegas plijunigi, plifortigi ankaŭ nian gazetaron.

5. Laŭ iniciato de la redakcio de HV ni okupiĝos pri ĉi tiu temo ankaŭ en la sekvontaj numeroj. Ni petis alparolon de 15 redaktoroj, do ni publikos iliajn pensojn unu post la alia, kaj aperigos ankaŭ alparolojn de niaj legantoj.

Mihály GERGELY

ENKETO DE REDAKTOROJ

Al redaktoroj de 15 esperantaj gazetoj kaj revuoj ni petis respondon al la sekvaj 4 demandoj:

1. Kiajn problemojn havas via gazeto?

2. Kiom da ekzempleroj kaj aparte abonantoj havas via revuo?

3. Kion vi opinias pri la hodiaŭa gazetaro de Esperantujo?

4. Viaj proponoj por plibonigi la ĝeneralan kondiĉon de nia gazetaro:

Ĝis nun ni ricevis respondon el la sekvaj redaktoroj:

Prof. d-ro B. Popović, redaktoro de Scienca Revuo

Kvankam la revuo, kiun mi redaktas, tre diferencas de la plimulto de la revuoj de Esperantujo, mi provos diri ion pri ĉiuj revuoj.

Nome SCIENCA REVUO havas nenian problemon aparte grandan, tamen ĝi batalas kun ĉiaspecaj malfacilaĵoj: financaj, redaktaj, teknike redaktaj (preparado por la presigo), iom ankaŭ la presigo mem, ekspedado, disvastigado.

Oni presigas ĝin en 1000 ekzempleroj, el kio ĉ. 600 estas sendataj al la abonantoj, ĉ. 150 estas sendataj senpage (al gravaj unuopuloj, institucioj, neregulaj abonantoj kaj al la delegitoj de ISAE por propagando); la resto kuŝas en la kelo por disvendado al postaj interesiĝantoj (ĉar la enhavo de multaj artikoloj restas aktuala multajn jaroj post la aperigo). Kun tiom da abonantoj kaj kun ioma disvendado de malnovaj numeroj oni povas elteni finance, sed nur kun senpaga redaktado kaj kun granda ŝparemo en ĉiuj elspezoj. Financajn malfacilaĵojn pligrandigas tre malfacila utiligo de la abonoj el la landoj sen libera monsendo eksterlanden. Kiam ni havos pli ol 1000 regulajn abonantojn, tiam forfalos financaj (kaj kunligitaj teknikredaktaj kaj presigaj) malfacilaĵoj.

Specifaj por SCIENCA REVUO estas la disvastigaj malfacilaĵoj. Nome la revuo povas publikigi la recenzojn nur se ili koncernas sciencajn librojn kaj artikolojn, pro kio ĝi ne povas utiligi reciprokan recenzadon kun aliaj revuoj. Eĉ pri la interŝanĝo ĝi ne estas interesigita, kiom koncernas la ĝeneralajn revuojn en Esperantujo. Nur de tempo al tempo kelkaj revuoj recenzas iun numeron (aŭ plurajn numerojn samtempe) de Scienca Revuo, ne pro la reciprokeco, sed pro donado de utilaj informoj al propraj abonantoj. La sekvo estas, ke tre malmultaj esperantistoj (des malpli neesperantistoj) konatiĝas kun la valoroj de Scienca Revuo. Pro tio multaj personoj ne abonas ĝin, eĉ kiam ili aŭdas pri ĝi, ĉar laŭnome ili opinias, ke ĝi aperigas nur la rezultatojn de sciencaj esploroj, ne sciante ke ĝi aperigas ankaŭ popularsciencajn artikolojn (sur simpla nivelo de mezedukita homo kaj sur altscienca nivelo). Do ĝi estas revuo ne nur por sciencistoj, sed ankaŭ por scienculoj kaj por personoj ĝenerale interesiĝantaj pri sciencaj problemoj.

Ŝajnas ke mi tro multe parolis pri la problemoj de Scienca Revuo. Nun mi turnas min al problemo komuna al ĉiuj E-revuoj kun internacia karaktero. Temas pri kolektado de la abonoj kaj utiligo de la tiel kolektita mono. Se oni tion faras per diversaj gazetagentejoj, la abonkotizo kutime duobliĝas, ĉar almenaŭ du agentejoj (en la lando de la revuo kaj en la lando de la abonanto) devas ion perlabori. Tio trafas plej multe malmultekostajn revuojn. Kunlige kun tio estas la aplikataj kurzoj de diversaj valutoj, pro kio regule la abonanton trafas kurzo por li plej malfavora (aŭ la revuo ricevas neplenan abonkotizon pro apliko de iu oficiala kurzo). Se oni kolektas la abonojn per propra delegita reto (de libervolaj kunlaborantoj), tiam venas granda aldona laboro por ĉiam restarigadi la reton kaj multaj zorgoj por trovi permeseblajn kanalojn por transpagi la monon en la landon de la revuo (precipe el landoj sen libera monsendo.)

Por pli facile transsaltadi tiajn malfacilaĵojn estas necesaj du aspektoj de kunlaboro inter E-revuoj, resp. inter iliaj eldonantoj. Unu konsistas en fikso de la abonkotizo en internacia valuto (por ni ĝi estas STELO) por la internacia abono, kun eventuala aldono de alialanda valuto sufiĉe forta por internacia merkato. Surbaze de tiu prezo, la peranto fiksos enlandan kotizon, tiel ke la revuo ne perdu, kiam oni realigas la transpagon (do konsideri iun realan kurzon kaj realajn eblojn de la transpago). La perantoj povas esti pli malmultnombraj se unu prenas la peradon por pluraj revuoj. Tiam E-organizaĵoj en tiu lando povas esti en kontakto kun tiaj perantoj (iam eĉ antaŭe garantii ilian fidindecon) kaj kun ili fari la interkalkulojn por utiligi la monon kolektitan en aliaj landoj por la revuo, kiun ili eldonadas. Tia konstanta kunlaboro povas ebligi la vivon al multaj revuoj, kiuj pro sia enhavo meritas esti internacie disvastigataj.

Kunlige kun tio mi deziras esprimi la opinion, ke oni devas disigi la revuojn kun la primovada kaj enlande varba karaktero disde la revuoj, kiuj havas difinitan fakan aŭ kulturan enhavon internaciskalan. La unuaj devas esti enlandaj kaj parte nacilingvaj (kiel oni nun ĉiam pli praktikas) kaj la aliaj nur esperantlingvaj kaj vere internaciaj. Tiam pri la internaciaj revuoj, precipe kiam ilia enhavo estas valora, devus zorgi ni ĉiuj, helpi ke ili ne havu la menciitajn malfacilaĵojn. Tiam la plej bonaj el ili elkreskus pli rapide.

Detlev Blanke, redaktoro de „der Esperantist"

Kvankam nur koncize tamen mi volas provi respondon al viaj demandoj.

1. Nia gazeteto „der esperantist" aktuale speciale suferas sub la fakto, ke la presejo ne kapablas presi ĝin akurate. Financajn aŭ redaktajn zorgojn ni ne havas. Tamen estus bonvene, se ĝi ankaŭ trovus legantaron en aliaj, precipe socialismaj landoj.

2. 5000 ekz., 2000 abonantoj en GDR, la aliaj eksterlande, precipe en Soveta Unio.

3. Tiun demandon oni nur povas respondi post pli detala analizo. Ĝenerale dirite, nur malmultaj revuoj esperantaj atingas la mezan nivelon de nacilingvaj kulturaj revuoj. Feliĉe HV apartenas al ili. Speciale senteblas ĉe multaj revuoj, bedaŭrinde ĉefe en nia socialisma ŝtataro, gravaj malfruiĝoj en la aperado.

4. Proponojn mi ne kuraĝas fari, ĉar tio postulas antaŭajn analizojn kaj prikonsiderojn, por kiuj aktuale mankas al mi la tempo.

Rilate la kunlaboron inter la redaktoroj, kiel vi proponas, mi volas mencii, ke ni plurfoje atentigis pri HV en „der esperantist", ekz. en „de" 57/58 (1973), p. 44, „de" 67/68, p. 31. Krome ni regule propagandas HV dum niaj CLR- kaj aliaj kunsidoj. Pli detalaj recenzoj pri HV en „de" sekvos estonte. Mi sincere bedaŭras, ke mi ne povis helpi al vi rilate al viaj bonaj proponoj, des pli, ĉar mi konsideras viajn proponojn tre gravaj.

Giorgio Silfer, redaktoro de Literatura Foiro

1. „Literatura Foiro" dum la unuaj jaroj baraktis en la malfacilaĵoj devenantaj el troa organiza ŝarĝiteco de la ĉefredaktoro: ja dum la ĉefredaktoro devis atenti pri ekspedisto, kiu ofte eraras en afranko, aŭ pri presisto, kiu konstante malfruas post promeso pri rapida eldono, li ne povis komplete disponi pri si mem por korespondi, publike rilati, kontakti, stimuli alies kunlaboron cele al pli altnivela redaktado; tamen, spite al ĉiu obstaklo (eĉ mia unujara foresto pro soldatservo), la „Foiro" progresas, grafike kaj enhave.

2. Eldonkvanto varias inter 750 kaj 1000 ekzempleroj, laŭ la numero; ĉiukaze ni devas kontentigi ĉirkaŭ 600 abonantojn (185 en Italujo), inkluzive de la patronaj kaj interŝanĝaj abonoj. Hungario, kun kvindeko da abonoj, montriĝas interesa merkato. Estas por aldoni, ke tiom da abonoj ni kolektis sen la apogo, patronado aŭ helpo de ia oficiala instanco en la E-Movado.

3. Ili plene respondas al la asocia matureco (aŭ senmatureco), lingva nivelo (aŭ misnivelo), kultura preparo (aŭ malpreparo) de la „samideanaro". Unuavide mi rimarkas, ke la meza gazeto spegulas la ecojn de la meza aktivulo: instruado pri Esperanto laŭ primitiva didaktiko, varbado de adeptoj laŭ malnovaj metodoj, movadismo laŭ romantikaj modeloj. Kelkfoje la movado meritas bonan gazeton (HEA kaj „Hungara Vivo"), alie estas troa niveldiferenco (Itala E-Federacio kaj „Literatura Foiro"). Sed ĝenerale direndas, ke ni havas multajn esperantistajn foliojn, dum ni bezonas ĉefe gazetojn en Esperanto.

4. La problemo estas vasta, ne nur merkata; mi iom pritraktis ĝin en la numero 6 de LF, antaŭ kvar jaroj. Kio nova nun?

La unua ŝtupo estus krei tutmovade agnoskatan, efektive talentan, juĝe objektivan kaj plurfacete kleran recenzistaron. Homoj ne mankas, sed ili tro malmulte konas unu la alian. Post tio estus eble direkti la guston de la publiko kaj unuavice de la redaktoroj kaj eldonistoj.

„Esperanta gazetaro en la mondo"

Kun ĉi tiu titolo aperis la kajero de *Stanislaw Rams*, pola publicisto kaj esperantisto, en Kraków 1973. Ni citas la lastajn liniojn de la studo:

„... La unuopa eldono de esperantaj ĵurnaloj oscilas inter la limoj de kelkcent ĝis 10.000 ekzempleroj. La plimulteco de ili ne superas 2.000 ekzemplerojn. La redakcioj ĝenerale ne publikigas oficiale la eldonkvanton. Ekzemple la unuopa eldono de tiaj ĵurnaloj kiel Heroldo de Esperanto kaj Esperanto atingas ĝuste tiun limiton. Kontraŭe Internacia Pedagogia Revuo atingas apenaŭ 600 ekzemplojn, la eldonkvanto de Internacia Ĵurnalisto estas eĉ iom pli malmultnombra.

Sendube, kiel jam menciite, la kaŭzo de malkontentiga situacio estas la neevoluinta reto de legantaro. Certaj statistikoj elkalkulis, ke en la mondo estas aktuale ĉirkaŭ 5 milionoj da adeptoj de esperanto. Ĝi estas certe troigitaj indikoj. Cetere la grado de internacilingva konado estas diferenca ...

Fundamenta bibliografio — 1. Ivan *Saratov:* Legolibro por superaj kursoj kaj memklerigo. Sofio, 1946 — 2. Alfonso *Pechan:* Gvidlibro por supera ekzameno, historio, literaturo. Vo. II. Budapeŝto, 1966 — 3. Ivo *Lapenna:* La internacia lingvo (Faktoj pri esperanto). Londono, 1954 — 4. Werner *Bormann:* Bona Ŝanco. Tenerifo, 1969 — 5. *Jarlibro de UEA* ..."

Kelko pri la starto de Literatura Mondo

Ŝajne la bona olda Literatura Mondo venis en modon, probable pro tio, ke japanoj ĝin represos en tuto, „kun ĉiuj ĝiaj neologismoj", kiel skribis Lajos Tárkony. Kaj eble ĉi tio kaŭzas, ke lastatempe mi pli kaj pli emas rerigardi al tiuj tempoj, kiam ni, la redakcio, klopodis ne nur fari, sed ankaŭ disvastigi, se diri vulgare, vendi tiun revuon. Por si mem, nome, oni ne redaktas revuon, maksimume skribas taglibron.

Kiam en 1922 ni ekirigis la revuon, nin trafis unu agrabla kaj du malagrablaj surprizoj. Agrable estis, ke tuj grandnombre sin anoncis kunlaborantoj el multaj landoj, inter ili nomoj, kiuj memorigis pri la „heroaj tempoj" de la lingvo, kiel *Leono Zamenhof, M. Solovjev* (kunlaborintoj jam de la Fund. Krestomatio) kaj *P. Nylén*, krome la renomaj esperantistoj *P. Stojan, I. Krestanov, St. Kamaryt, R. Hromada* kaj la famiĝontaj debutantoj *N. Hohlov, J. E. Leppäkoski* (tradukonto de Kalevala), *L. Briggs* (tradukontino de „Sonĝo de Someromeza Nokto"), *Helmi* kaj *Hilda Dresen, H. Seppik, T. Morariu, Raymond Schwartz, Waringhien* ktp.

Malagrabla surprizo estis, unue, ke preskaŭ tute forestis la eĥo en la E-a gazetaro. Mi povus nomi eĉ redaktoron de gazeto, kiu sendis al ni verkaĵon por publikigo, sed zorge gardis sin mencii nian revuon en sia gazeto. Ni miris kaj ne komprenis tion; cetere pri io simila nun plendas ofte Lajos Tárkony en sia Revuo de Revuoj.

La duan malagrablaĵon vi certe divenos: la abonantaro kreskis nur po maldensaj gutoj. En iu redakcia kunveno, kiam ni konstatis, ke lastsemajne venis amaso da poemoj kaj nul abono, iu el ni diris amare: Ŝajne la esperantistoj dividiĝas en du partojn: en poetojn kaj en analfabetojn". Je tio, iu alia redakciano, kiu turmentadis sin per la lego de alsenditaj poemoj, diris kun ĝemo: „Bedaŭrinde, eĉ inter la poetoj troviĝas analfabetoj". „Ankaŭ Homero estis analfabeto" — replikis la tria, sed per tio li ne tre konsolis nin.

Teodoro Schwartz, la tiama eldonanto de la revuo, de kiu nelonge antaŭ lia morto, en 1965, aperis ĉe Stafeto la libro „Maskerado ĉirkaŭ la morto", tiel same ne perdis sian fidon, kiel poste, dum la „nazimondo", pri kiu temas en lia libro. Li eldiris la sloganon: „Ni ĉasu abonantojn!". Kaj kie oni povus trovi pli taŭgan ĉasteritorion de abonantoj ol en Universala Kongreso. Li tenis do al ni proksimume jenan oracieton: „Vi, Baghy, estas fama pro via »Preter la Vivo«, krome vi estas aktoro kaj reĝisoro. Vi, Kalocsay, estas vaste konata pro via »Mondo kaj koro« kaj pro la traduko de »Johano la Brava«, kaj pro via »Kongresa Runo« deklamata en Helsinki. Vi nepre povas kaj nepre devas fari por ni grandan bruon en la Nürnberga Kongreso. Kolektu taŭgan trupon, ni vojaĝos tien korporacie."

Fakte, ni decidis, ke en Nürnberg ni ludos kabareton. Por tio ni varbis la kanzonistinon *Irena Noiret*, la aktoron *Mihály Sárossy*, kiu havis tre agrablan baritonon kaj povis sin mem akompani per gitaro kaj la du fratinojn *Pechán*, el kiuj *Corona* havis neordinaran kapablon ludi rolon komikan kaj *Anna* estus grandŝanculino de „Miss Kongreso", se tiam belkonkurso jam estus aranĝita.



Nia „Lingva revizianto": K. Kalocsay en sia laborĉambro. Foto de János Eifert, en 1971.

Nian kabaretludon ni faris antaŭ plenŝtopita spektejo. Ni ludis ĉarme ironian unuaktaĵon de J. Heltai: „La paĝio de la reĝino", prezentatan de la trupo de L. M. Groteskan ŝercon de F. Karinthy ludis Baghy kaj mi. Irena Noiret kaj M. Sárossy kantis kanzonojn, speciale zorgante pri tio, ke la teksto de la kantoj ĉiuvorte estu bone komprenebla. La tuton enkondukis prologo en versoj, kiu miksis la propagandon por nia revuo kun la apologio de E-o kiel poezia kaj teatra lingvo. La sukceso estis grandega: E-o vere viviĝis sur la scenejo, vivigis ĝin baladoj, romancoj, serenadoj, barkaroloj, transkapiĝoj de plej kurioza farso, naiva sed freŝa voĉo de popoleska kanto: „Tra la stratoj, tra la stratoj, marŝas, marŝas la soldatoj". Poste plurfoje mi aŭdis, ke iu aŭ alia kongresano ĝin zumas por si.

La materiala sukceso tamen estis malgranda; ties kaŭzo estis inter aliaj la furiozado de plej freneza inflacio en Germanio. Ankaŭ la gazetara eĥo estis tre magra. Kelklande pro politikaj kaŭzoj: en la landoj de la Entento nin, hungarojn, oni rigardis duongermanoj. Alilande pro miskompreno: la kabareto tie estis io triviala, vulgara, preskaŭ fia, dum ĉe ni en Hungario ĝi estis nobla amuzejo, kie oni kantis la poemojn de la plej bonaj poetoj (Ady, Babits, Kosztolányi, Szép, Emőd ktp.). Tion ne sciante, kaj eble eĉ ne ĉeestinte la prezentadon, pluraj, raportantaj pri la kongreso, skribis pri nia entrepreno kiel pri io malalta, neinda al E-o.

Ni ĝuis la sukceson, glutis la mallaŭdojn, Teodoro Schwartz elportis la materialan malsukceson, dirante: „Post unu jaro ree estos kongreso! Spiro, spero!" Do, ni spiris kaj esperis plu.

K. KALOCSAY

HUNGARA VIVO – kiel la legantoj ĝin taksas

En nia kutima rubriko „Leterkesto" ni citas partojn el la leteroj de niaj Legantoj kiuj estas foje laŭdaj, foje kritikaj kun proponoj por la estonto.

Same ĉi tiu artikolo volas ĉerpi el la leteroj ricevitaj kaj celas prezenti opiniojn de la Legantoj pri „Hungara Vivo".

Jen por komenci ni citas el letero s-ro. Bertil ENGLUND, Svedio:

„H. V. estas fakte ia „raraĵo" en la E-lingva mondo. Ĉu ne estas ia „senrespondeco" ĉe certaj rondoj de E-istoj ke oni prisilentas la ekziston de tia vere *reprezentativa* organo kiel H. V.? Ankoraŭ certaj E-istoj malŝparas penon disvastigi pere de E. sensencaĵojn, ripetaĉojn... H. V. meritas multe da atento, ĉar kiamaniere ni povos konvinki seriozajn homojn pri la praktika valoro de E., se oni blinde disvastigas propagandon surbaze de arkaikiĝintaj idealoj??? (Ĝi belas al la *nuraj* pri-esperantaj-istaj temoj. »Verda famili«-politiko.)

Do, *per* E. pri amasoj da variaj temoj en niaj publikaĵoj estas la vojmontrilo estontece por pruvi, vere motivi, ke E. funkcias same nature kiel aliaj lingvoj sur ĉiuj kampoj de homa vivo. H. V. estas tre ekzemplodona por ni!

Ekzemple, antaŭ mi kuŝas n-ro 6. de 1974. La tripaĝa artikolo okaze de televida intervjuo kun d-ro Albert SZENTGYÖRGYI, hungara Nobelpremiito. Mi povas certigi ke la enhavo de tiu artikolo interesus multe da homoj. Estas nur eta ekzemplo, ĉar multajn ĝeneral-klarigajn temojn oni trovas en ĉiu n-ro de H. V. Per E. pri *multflankaj* temoj!"

Ĝojigaj por ni estas tiuj ĉi linioj, sed krom la mallarĝanimeco de „certaj rondoj de E-istoj" ni havas ankaŭ aliajn malhelpaĵojn... Ni citas el la letero de s-ro Johannes PAYU, Estonio:

„Mi ricevis hieraŭ la n-ron 6. Por la tuta estona esperantistaro ni ricevis vian valoran revuon nur en dek (jes, 10) ekzempleroj, samtempe ni havas en Estonio (38 lokaj grupoj-rondoj-kluboj) kelkcent membrojn, el kiuj ni, laŭ pasintjara proksimuma informo, kolektis pli ol 60 dezirantajn aboni Hungaran Vivon.

Kiel ĉiuj antaŭaj, ankaŭ la lasta numero por 1974 estas kun altira enhavo. La artikolo pri hungaraj scienculoj multe kompletigis miajn sciojn pri via scienco kaj scienculoj: mi antaŭe konis nur Bolyai, Semmelweis, Teller... La sensacia trovo de skulptaĵ-galerio en Burgmonto ĝojigis min same kiel vin. Per artikolo kiel tiu de W. Auld pri J. Francis fariĝas via revuo pli kaj pli internacia — kaj mi opinias tion bona, ĉar la lingvo mem instigas al internacieco. Bonega estas la respondo de Reto Rossetti al »Amiko E. 18«, sprita, plezuriga.

Apartan dankon kaj aprobon mi diras al vi por la artikolo pri la kultura plano de »Paco«-anoj el la Maŝinfabriko »4-a de Aprilo«. Tio estas la unua perlo en atendota longa vico da baldaŭ sekvontaj samideanaj juveloj por nia lingvo. La iniciato estas des pli valora, ke ĝi venas de simplaj laboristoj (kiom oni metalurgojn povas titoli »simpla« laboristo, tio estas alia demando), kaj pro tio estas la artikolo kvazaŭ »unua hirundo« en la direkto, kien nia lingvo devas iri: al la laboristoj, al la klaso, kiu kreas, kiu regas la vivon. Gratulon al vi, hungaroj! Kun via permeso mi tradukos la artikolon en estonan lingvon kaj donos al niaj gazetoj. Miaj lernantoj sendos al ili saluton, evidente ili jam konas la lingvon kaj povos kompreni saluton de fratpopola junularo?"

Pri la sama temo skribas s-ro Max HILLEBRAND el Ĉeĥoslovakio jene:

„Al mi tre plaĉis la sukcesa intervjuo kun kamarado GÁSPÁR kaj artikolo »Kultura plano de la fergisa brigado —PACO— de la Budapeŝta Maŝinfabriko — 4-a de Aprilo«. Tiuj ĉi raportoj estas tre gravaj kaj taŭgaj por povi bone propagandi la utilecon de E-movado. Dankon por ili".

Ni ĉiam konsideras opiniojn kritikajn de niaj Legantoj, kiel ankaŭ ni havas opiniojn pri aliaj Esperantaj periodaĵoj. Staru ĉi tie kiel ekzemplo citaĵo el letero de s-rino Marie BARTOVSKÁ el Ĉeĥoslovakio:

„Mi klopodis forgesi pri tio, kion mi legis sur la 28a paĝo en la 1-a numero de H. V. Tamen ne eblas: Vi skribas, ke duobla negacio estas ebla, sed AVO pravas, ke ĝi ebla ne estas. En la zamenhofa ekzemplo evidente vi, aŭ iu antaŭ vi, ellasis tie komon, paŭzosignon aŭ punktokomon; eĉ punkto povas esti. La vorto »neniam« do apartenas en alian frazon aŭ almenaŭ propozicion. Se oni post ĝi skribas krisignon (!), la akcento ankoraŭ plifortiĝas. La »regulo« pri samsencaj tri negacioj en la naciaj lingvoj ne pravas, ĉar en tiuj lingvoj, kie oni allasas pli ol unu negaciojn en la sama propozicio, povas esti eĉ kvin negacioj kaj tamen ili ne ŝanĝas la sencon de la negacia propozicio; unu aŭ kvin estas preskaŭ egale. Unu ĉeĥa kanto sonas: *Ni*kdy *ni*c *ni*kdo *ne*má míti za definitivní, neb *ni*kdy *ni*kdo *ne*ví, co se může státi... Neniam iu ion rigardu kiel definitivan, ĉar neniam iu scias, kio povas okazi... Du propozicioj negativaj; en Esperanto du negacioj, en la ĉeĥa sep. Kaj tamen la senco estas la sama.

Al s-ano Karolo PÍČ vi riproĉas sur la sama paĝo, ke li kontraŭas neologismojn, kaj »svingas« per »teknikaj terminoj«. Sed s-ano Píč ne kontraŭas ja la teĥnikajn vortojn. Speciale pro tio, ke Esperanto bezonas ankoraŭ amasegon da teknikaj terminoj, necesas ne malŝpari la sonmaterialon, el kiu oni la *gravajn* neologismojn povas fari. Ĉu »dura, olda« kaj similaj sinonimoj de la vortoj jam ekzistantaj, estas teknikaj terminoj? Mi ne kontraŭas poemojn, ankaŭ belartojn ni bezonas, sed unue ni havu riĉan fakan literaturon. Ĉu vi konas iun homon, kiu lernis ian fremdan lingvon *nur* por legi aŭ aŭskulti poemojn? Mi dum mia longa vivo tian homon ankoraŭ ne

renkontis. Ĉiu lernas, aŭ klopodas lerni fremdajn lingvojn por gajni iajn sciojn utilajn al lia profesio, t.e. al lia monujo. Eble kelkaj homoj vivtenas sin per poemoj, sed certe ne la plejparto".

Koncerne la demandon de duobla negacio, se estos bezonate, ni ankoraŭ revenos en aparta artikolo. La lasta frazo citita el la letero de s-rino M. BARTOVSKÁ pri vivteno per poemoj por Esperantio estas prava eĉ pli! Tamen ni sur paĝoj de H. V. volonte publikigas poemojn tradukitajn. Niaj Legantoj aprobas tiujn klopodojn. Ĝin pruvas la sekvaj kiujn skribis al ni Jiří KOŘÍNEK same el Ĉeĥoslovakio:

„Kun granda ĝuo mi tralegadas ĉiun numeron de via modela gazeto, kiun abonas nia rondeto. En la lasta kluba monat-kunveno mi ĝin varme rekomendis al ĉiuj klubanoj. Ĝi digne anstataŭas la iaman Literaturan Mondon kaj mi konsideras ĝin nuntempe plej bona kaj interesa Esperanta periodaĵo. Ĝia valoro pliiĝas, ke, kvankam subvenciata de ŝtato, ĝi ne trouzas propagandan manieron, kiu ĉe iuj tiaspecaj gazetoj preskaŭ ĉiulinie elpuŝas siajn kornetojn. La necesa propaganda celado restas en limoj de belgusto kaj evitas ĉian »surŝovelan« prezentadon de aferoj, kiu povas imponi nur al primitivuloj. Male, la temoj prikulturaj, literaturaj kaj tuŝantaj sferon de nia lingva komunumo donas al H. V. grandan intereson kaj altan nivelon. Evidentas, ke ĝin gvidas lingvaj korifeoj kaj kontribuas al ĝi ankaŭ eksterlandaj eminentuloj".

Ni citas ankoraŭ unu leteron kiu venis el Sovetunio:

„Estimata samideano redaktoro! Karaj redakcianoj!

De multaj jaroj mi estas leganto de via revuo, kiun mi konsideras la plej bona periodaĵo en Esperanto, samnivela kun la plej bonaj nacilingvaj gazetoj. La ricevo de ĉiu numero de H. V. estas por mi festo.

La revuo estas kompilata kaj redaktata tre kompetente, la lingvaĵo estas brila, la temaro abunda, la prezento tre trafa.

H. V. bonege prezentas al la mondo la hungaran kulturon kaj samtempe la kulturon Esperantan.

Mi dankas vin, karaj geamikoj, pro via sindona servado al via belega patrujo, al nia komuna lando Esperantujo

B. KOLKER, delegito de UEA"

Ni estas konvinkitaj, ke ni iras sur bona vojo, servas por noblaj celoj. Ankaŭ en la futuro ni atendas Viajn rimarkojn, kritikojn kaj dezirojn por ankoraŭ pli bone plenumi niajn taskojn estontajn.

L. RIETH

Opinioj pri „Eszperantó Magazin"

ESPERANTO (1974 junio, publike la fotokopion de titolpaĝo de EM) „La eldona aktiveco el la nacia lingvo, kiun dum lastaj jaroj praktikas Hungara Esperanto-Asocio povas liveri pruvojn, ke la ideoj, kiujn ĝi tie traktas dr-o Bormann, jam donis bonegajn rezultojn en la praktiko."

LA BRITA ESPERANTISTO (January—February, 1974): „Grava eldonagado en Hungarujo. — En sama formato kaj amplekso kiel »Hungara Vivo« aperis en oktobro unua numero de Eszperantó Magazin hungarlingva informa revuo pri la internacia lingvo Ĝi aperos monate en 10 000 ekzempleroj. La unuan numeron tre favore akceptis la cetera hungara gazetaro..."

LA ESPERO (1973—6): „... La ekstera formo de la revuo estas jam konata al la legantoj de la kulturrevuo »Hungara Vivo«. Do, la tipografio estas imitinda. Sendube tiu ĉi eksperimento estas interesa kaj indas sekvi ĝin por ion lerni, ĉu oni eventuale povus trovi rimedojn, ideojn kaj fortojn por lanĉi similan, regulan informilon ankaŭ en aliaj landoj.

Omaĝo al la virinoj okaze de la Internacia Virina Jaro



Plaketoj de Erika Ligeti

Pasinto kaj estonto

Pensoj pri la esperanta gazetaro

Emfazi la gravecon de la gazetaro en la evoluo de la Esperanto-movado estas jam ne tro originale, kiel ankaŭ nomi ĝin „kunkreanto de la movado" ne signifas inventi la radon. Por ĉiuj el ni estas klare, ke la 1-a de septembro de 1889 — aperdato de la unua esperanta revuo, *La Esperantisto* — estas almenaŭ tiel signifa tago, kiel la 14-a de julio de 1887, apertago de *La Unua Libro*.

La Esperantisto ĝis la fino de 1889 akiris 113 abonantojn. Tio signifis ne nur modestan eblon por la plua aperado, sed ankaŭ adresaron de 113 homoj, parolantaj Esperanton, legantaj la saman gazeton, kies forto ne nur konservis inter ili la unuecon de la skribata lingvo, sed donis ankaŭ komunan intelektan nutraĵon. Tiu komuna intelekta nutraĵo kreis la praĝermon de la nuna esperantista kultura komunumo, kies nombro en nia tempo jam estas inter 10 000—20 000 personoj.

Krom la gardado de la unueco de la lingvo, la kultura-idea interproksimigo kaj ioma kultura kunfando de homoj diversnaciaj kaj diverskulturaj, la gazetaro fakte estas ankaŭ generanto de la esperanta literaturo. La unuaj originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj aperis sur la paĝoj de *La Esperantisto* kaj *Lingvo Internacia*, sed eĉ nuntempe la gazetaro okupas gravegan rolon en la esperanta literaturo. Tiu ĉi fakto havas plurajn, tamen simplajn kaŭzojn. La unua estas financa: presigi revuon ĉiam kostis malpli ol presigi libron, ja revuo povas esti eĉ nur 4-paĝa kajero. La dua kaŭzo kuŝas en tio, ke Esperanto estas praktike por ĉiuj lingvo lernita el libro, kaj homo kun modesta lingvoscio plie emas legi gazeton ol libron. Nia librolega kulturo eĉ nuntempe estas harstarige nekontentiga, sekve la ĉefa kanalo, en kiu fluas la literaturo al la legantoj, estas la gazetaro.

Tamen, la ĉefan ŝarĝon de la supraj cirkonstancoj portas nur ne tro granda parto de la gazetaro, nome, la kulturaj revuoj kaj la internaciaj kaj landaj movadaj organoj. La fakaj revuoj en Esperanto — kvankam sufiĉe multnombraj — atingas nur etan parton de la legantoj, kaj ili servas kiel dua, tria aŭ kvara gazeto por siaj abonantoj.

Tiel estis jam antaŭ la unua mondmilito, kiam publikiĝis ne multe malpli da gazetoj, ol nuntempe, kaj la ĉefa furaĝo por la legantaro estis la du internaciaj ĝeneralinteresaj revuoj: *La Esperantisto* (1889—1895) kaj *Lingvo Internacia* (1895—1914). Al ili aldoniĝas la gravega kultura organo *La Revuo*, aperinta inter 1906 kaj 1914 entute sur 6164 paĝoj. Nepre menciindaj el tiu ĉi periodo estas ankoraŭ la kulturaj revuoj *Danubo* (1910—1912) kaj *La Ondo de Esperanto* (1909—1917). Jam en tiu ĉi periodo funkciis la revuo *Esperanto* (fondita en 1905).

La unua mondmilito preskaŭ komplete forblovis la gazetaron, kiel ankaŭ la movadon mem, sed la postmilita porpaca atmosfero baldaŭ ebligis la renaskiĝon de la verda preso. Floris la landaj movadaj gazetoj, kaj ekaperis en la internacia merkato kulturaj revoluoj diverstendencaj kaj bonkvalitaj. Elstaras inter ili *Literaturo Mondo* (1922—26, 1931—39), sed menciindas ankoraŭ *Literaturo* (1919—1925), *Ondo de Daŭgava* (1925—1931) kaj la komunisma *La Nova Epoko*. En tiu ĉi periodo floris ankaŭ la *Kataluna Esperantisto* (1910—1928), kiu publikigis multajn literaturaĵojn el la plumo de la plej famaj originalverkistoj. En tiu ĉi periodo, en la jaro 1920, ekaperis la revuo *Esperanto Triumfonta*, kiu en 1925 ŝanĝis la nomon je *Heroldo de Esperanto*, kaj aperis dum kelka tempo *semajne*. Tamen, la eldonkvanto de la plej bonaj revuoj estis ekstreme malalta: ekz. la nombro de la abonantoj de *Literaturo Mondo* ŝajne neniam atingis 500.

Post la dua mondmilito ripetiĝis la renaskiĝo, okazinta en la dudekaj jaroj. Krom la movadaj organoj renaskiĝis *Literatura Mondo* (1947—1949), kaj regule aperadis la bonega *Internacia Kulturo* (1945—1952). En 1955 montriĝis la unuaj promesplenaj signoj de la mildiĝo de la malvarma milito, kaj en tiu jaro ekaperis du perlaj revuoj: *La Nica Literatura Revuo* (1955—1962) kaj *Norda Prismo* (1955—). Gravaj kontribuaĵoj al la Esperanta gazetaro estis ankaŭ la apero de *Nuntempa Bulgario*, *Vjetnamio Antaŭenmarŝas* kaj *El Popola Ĉinio*. Nia *Hungara Vivo*, depost sia apero en 1961, same fidele servas la internacilingvan kulturon. UEA en 1962 mem eldonis kvaronjaran literaturan revuon sub la titolo *Monda Kulturo*, sed ĝi vivis nur ĝis 1966. Iom maljuste oni ignoras la dumonatan kulturan revuon *Kulturaj Kajeroj* (ekde 1958), kiu estas la eldonaĵo de la Esperantista Kulturdomo en Grésillon. En 1970 aperis nova kultura revuo, la *Literatura Foiro* en Italujo, kies amplekso estas tamen iom modesta, kaj dum la lasta tempo ankaŭ enhave ĝi perdas iom el sia komenca allogeco. En Japanujo aperas pluraj gazetoj, el kiuj elstaras la kultura revuo *Oomoto* (ekde 1925) kaj la aspekte modesta, sed valora *L'Omnibuso* (ekde 1964).

La Jarlibro de UEA en 1974 notas entute 101 esperantajn revuojn, sed tiu sumo inkluzivas ankaŭ jarlibrojn, jarajn informilojn kaj nacilingvajn propagandajn bultenojn. Farinte ioman kribradon, mi konstatis, ke maksimume 89 el ili povas klasiĝi kiel Esperanta revuo. Mi ekzamenis ankaŭ la Jarlibron de 1965 (tiun de 1964 mi ne havis ĉemane),

kaj aplikante la samajn kriteriojn, mi povis trovi 99 gazetojn. El la ĉefaj karakterizoj de la du listoj mi faris malgrandan statistikon, kies ciferoj ŝajnas pripensindaj.

Ritmo de la aperado:	*1974*	*1965*
Aperas monate aŭ pli ofte	25	26
Aperas dumonate	28	34
Aperas kvaronjare	25	27
Malpli ofte aŭ neregule	11	12
Teknika aspekto:		
Presitaj	68	57
Multobligitaj	21	42
Lingva aspekto:		
Tute esperantlingvaj	59	58
Parte nacilingvaj	58	41

Ni aldonu tamen, ke la redaktoroj de la Jarlibro 1974 ŝajne ne bone scias distingi inter tekniko presa kaj multobliga — pluraj periodaĵoj el la 68 „presitaj" tute ne aspektas tiaj.

Aparte doloran bildon montras la komparo de la listoj el 1965 kaj 1974: el la 99 periodaĵoj de 1965 nur dum 9 jaroj malaperis 45 (krom la evidentaj nomŝanĝoj). Kompreneble aperis ankaŭ novaj revuoj, entute 35, sed tiuj ciferoj montras egan nestabilecon.

Rilate la plej gravan indikilon, la eldonkvanton, fidindaj ciferoj mankas. Roman Dobrzynski en sia diplomiĝa referaĵo pri la esperanta gazetaro trovis, ke en 1953 la esperanta gazetaro havis la mezan eldonkvanton de 1700 ekzempleroj. *Esperanto* de UEA tiutempe aperis en 7000 ekz. (nun inter 8000 kaj 9000), *Sennaciulo* en 4000, sed la plimulto de la gazetaro ne superis 1000 ekzemplerojn. Ŝajne la situacio ne multe ŝanĝiĝis intertempe (kvankam laŭ la aserto de Dobrzynski *Nuntempa Bulgario* komence de la sesdekaj jaroj atingis la eldonkvanton de 16 000 ekzempleroj!), kaj tiu ĉi stagnado jam en si mem pruvas, ke radikalaj ŝanĝoj en la redaktado, teknika nivelo kaj kolportado estas necesaj.

Estus interese studi iomete ankaŭ la *relativan* situacion de niaj gazetoj, kompare al la nacilingva gazetaro. Mankas al mi la necesaj datoj por fari konkludojn, sed trudas sin la verŝajna hipotezo, ke ĝi ege malboniĝis. Ekzemple, komence de la jarcento la kvanta proporcio de la esperantlingvaj gazetekzempleroj presitaj dum unu jaro certe estis pli bona ol nun, ja la nacilingva gazetprodukto almenaŭ dekobliĝis, dum la esperanta altiĝis maksimume ĝis trioblo. La samo validas ankaŭ koncerne la mezan amplekson de la periodaĵoj. La relativa teknika nivelo nepre malboniĝis: *La Revuo*, kaj eĉ *Literatura Mondo* teknike ne multe postrestis al la tiamaj kulturaj organoj, dum *Literatura Foiro* kaj la nova *Norda Prismo* krias per sia teknika amatoreco. Kaj dudek jarojn post la ĝenerala venko de la kolorbilda tekniko ankoraŭ neniu esperanta periodaĵo havas la eblon apliki ĝin . . .

La ŝajna stagnado fakte estas danĝera regreso. Cerbumi pri la kuracmetodoj estas devo de ĉiu *vera* esperantisto.

V. BENCZIK

ISTVÁN PÁKOLITZ:

SIRENO

En or-lazuran brilon de septembro
bruo sirena interkriĉas.
Mi scias ja, ke nur por provo,
sed por moment' paraliziĝas:
arom' de paco gustumita
amariĝas sub mia lango,
korpon ekkaptas trem' timiga,
ekardas febre vango
pro ĉi muziko freneziga!
— Por tio estis do lukt', esper' kaj peno,
ke ŝnurego de voĉo kriĉanta
volviĝu al nia kol' kun premo!?
Sireno bruas.
La stigmatoj denove ŝvitas sange:
trema Terur' en la kelon kuras
kaj al patrina mam' falante
infano jam grizharara mutas
fuĝanta koĉer' ĉevalon batas per stango
dum de la renversita ĉar'
vertiĝe giras plu la rando
inter kvar muroj amgardantaj
kirliĝas fumo polvo
kaj splitbatita kajer' aritmetika
tremas pro t i u solvo
survoje ombrojn de estintaj homoj
pelas freŝrazitaj homoj armilhavaj
el okuloj gvatas mort' ili cetere
ŝajnas normalaj
de homviando odoras amare
oni fajfante al altaj piramidoj
portas homhararojn kaj ŝuojn pare
de la homidoj
El la stigmatoj denove sango fluas.
Vidu blindulo! Kriu mutuloj!
Aŭdu la surdaj!

Sireno bruas.

Tr. Márton FEJES

István PÁKOLITZ naskigis en 1919, en malriĉa familio. Lernis ĉe jezuitoj por fariĝi pastro, poste akiris instruistan diplomon. Instruis en pluraj vilaĝoj, dume finis universitaton. Kvankam li verkis jam en la tridekaj jaroj, debutis per memstara poemaro nur en 1954. De tiam aperigis aliajn ok poemarojn. Li gajnis ankaŭ la literaturan premion „József Attila". Tradukis dramon de Schiller: Maria Stuart. La poemon: „Sireno" ni elektis el lia poemaro „Jel" („Signo", — elektitaj poemoj 1968).

La laboristoj kaj la lingvostudado

Verkis: Gyula Virizlay, la kultura sekretario en Landa Konsilantaro de la Hungaraj Sindikatoj

En sia novembra numero de 1974 Eszperantó Magazin publikigis konsiderindan alvokon. La fergisista brigado „Paco" de la Budapeŝta maŝinfarejo „4-a de Aprilo" surprenis la taskon ellerni Esperanton, kaj proponis al aliaj brigadoj, ke tiuj aliĝu al ilia moderna iniciato. Mi esperas, ke la sindikataj kulturaj funkciuloj legis kun interesiĝo la alvokon. La plimulto bone scias, ke multaj esperantistoj estis proksime al la laborista movado. Samtempe multaj batalantoj de la laborista movado, inter ili niaj pluraj martiroj, estis ankaŭ entuziasmaj esperantistoj.

En hungara esperantista movado nuntempe pli grandproporcie partoprenas laboristoj. Hodiaŭ HEA kun apogo kaj protektado de Landa Konsilantaro de Sindikatoj povas fari sian kulturan aktivecon.

Certe, ke ankaŭ la sindikataj rilatoj havis rolon en tio, ke oni vendis ekde la liberiĝo 100 000 esperantajn lernolibrojn. Tiu nombro en si mem montras, kiom da homoj komencis — kaj mi pensas, ke multaj ankaŭ finis — la studadon de Esperanto. Kial altiris tiu lingvo tiom multe da homoj? Mi opinias, ke antaŭ ĉio tial, ĉar en la plejparto de la laboristoj vivas la pretendo de kulturo, ĉar ilia forta deziro estis ĉiam, ke oni povu legi, povu interŝanĝi siajn pensojn ankaŭ kun laboristoj alilandaj.

En niaj tagoj, multo diversa okazis ĉe ni por grandigi la kulturecon de laboristoj.

Kiel ni imagas la kulturitan laboriston?

Tiel, ke li estas multflanke klera, konstante pligrandigas sian scion, interesiĝas pri ĉio, ekscitiĝas de siatempaj sociaj, politikaj, ideologiaj demandoj, amas sian patrujon, estas fidela al sia klaso, estas aktiva en la formado de la socio, apogas la progresemajn klopodojn de aliaj socialistaj kaj nesocialistaj popoloj, ŝatas sian laboron, vivas honeste, pensas en socialista maniero, kaj mi povus ankoraŭ daŭrigi la deziratajn karakterizaĵojn.

Se ni volas eduki tiajn homojn, tiam ni devas konscie klopodi, ke ni veku en la homoj postulojn je kulturigado. Do ni deziras de ĉiuj, kies bazaj konoj estas mankhavaj, ke ili finu la okjaran ĝeneralan lernejon kaj poste kiom eble pli multaj venu en mezlernejojn kaj altlernejojn.

La sindikata movado en ĉiu teritorio, ankaŭ en la edukado, nur tiam povas atingi rezultojn, se ĝiaj klopodoj renkontiĝas kun la aktiveco de la laboristoj. Ni neniam pensis pri tio, ke en la intereso de la laborista kulturo ni popularigu nur kelkajn branĉojn de la kulturo inter la sindikatanaro. Ni egalproporcie instigas por plua studado, por altigo de la ĝenerala kaj faka kulturo, por legado de bonaj libroj, por la kompreno kaj kultivo de bona arto.

La lernadon de fremdaj lingvoj ni konsideras kiel unu formon de laboristkulturado. En Hungario hodiaŭ centmiloj studas aliajn lingvojn. La socialismo estas komuna ideo de la laborista klaso en ĉiuj landoj, do kompreneblas, ke la laboristoj de diversaj landoj kun pura koro helpas unu la alian. Por ke ili povu kunlabori, ili bezonas kompreni unu la alian, la komprenilo estas la kono de alipopolaj lingvoj. Sed por prosperi almenaŭ en Eŭropo, oni bezonas scii la rusan, germanan, francan kaj la anglan lingvojn. Eĉ la bazgrada alproprigo de tiuj lingvoj estas senespera entrepreno. Unu sola lingvo estas, Esperanto, kiun ankaŭ la laboristoj, vivantaj en ajna regiono de la mondo, relative facile povas alproprigi dum 4—8 monata lernado, ĝis parolnivelo necesa por ĉiutagaj interrilatoj. Pro tio povis diri Jean Jaurès, la granda franca socialista politikisto kaj historiiisto: „Esperanto estas la latino de la demokratio".

Ĝi estas tia komuna lingvo, en kiu esprimiĝas la praa espero vivanta en homoj, ke oni homdigne povu kompreni idojn alipopolajn, kaj tiel persone povu konatiĝi kun ilia vivo, kun iliaj zorgoj. Do internacian kaj kulturan signifon havus tio, se plimultaj povus ekkoni la internacian lingvon el homoj mane laborantaj, el la vicoj de la laboristoj. Tio ebligus por ili, ke ili povu trovi rekte fakajn kaj amikajn rilatojn kun alilandaj laboristoj kaj laborist-brigadoj.

Tiu nobla iniciato meritas apogon. Niaj sindikataj komitatoj — kiuj helpas multajn formojn de la kulturo —, akcelu tiun klopodon. Ili instigu niajn socialistajn brigadojn por aliĝo al tiu alvoko, kaj la demandon de lingvokursoj ili solvu kunlabore kun HEA.

Tia nobla konkurso povas kontribui al la plua fortigo de popolamikeco. Mi kredas, ke jam ankaŭ pro tio la sindikataj komitatoj devas apogi la studadon de tiu lingvo, devas popularigi la alvokon de la fergisista brigado el Maŝinfabriko „4-a de Aprilo".

Mi opinias, ke la sindikatoj de aliaj socialismaj landoj devus subteni inter siaj organizitaj laboristoj, inter la socialistaj brigadoj la ellernadon de la facile alproprigebla lingvo Esperanto. Inter laboristoj vivantaj en diversaj landoj — helpe de la ellernita sola lingvo por ĉiuj —, la senpere kreiĝantaj metiaj, amikaj rilatoj povus fortigi kun nova enhavo la internacian sindikatan movadon, kaj ankaŭ la aferon de la tuthoma progreso.

(Aperis en budapeŝta Eszperantó Magazin num. 3/1975).

Tradukis TI

ATTILA JÓZSEF

KUN PURA KORO

Patron, panjon, hejmon, dion
mi ne havas, nek patrion,
nek lulilon, nek ĉerktolon,
amon, kison aŭ brust-molon.

Mi tri tagojn fastas tute,
jes, ne manĝis absolute.
Dudek jaroj — ho, potencas!
Ilin vendi mi intencas.

Se neniu ilin pretendos,
al diablo mi ilin vendos:
mi pur-kore elrabos domon,
se necese, murdos homon.

Sekvos kapto kaj pendumo,
kovros min beata humo,
kreskos morto-porta floro
el belega mia koro.

KANTO DE JUNEDZINOJ

La mentono lanugeta estas ronda kaj koketa,
bela kapo, vigla kruro, rekta dors' de blanka puro
kaj l'okuloj kaj la buŝ'!

Ni dancfleksan fajron faras, bakas-kuiras.
Dum la vangoj ruĝas fajre, en bakujo ŝvelas fajne,
brunemajle nia kuk'.

Nin eĉ vento amindumas, burĝonantan bruston palpe cirkaŭŝvebas,
nian bonodoron portas, nian rondan jupon tordas, flirti levas.

Ni purigas, polvon viŝas, el la haroj ligas nodon
kaj ĝin lulas paŝetante kiel koko sian kreston

Nia freŝa koksbalanco, braka, puga ludodanc
kiel se en rosa herbo en amaso lukte luda
gajaj grasaj infanetoj rulas sin kun korpo nuda.

Jenő Szőnyi: Nudo

La edzeton vesperhore kun lavakvo, manĝo, kiso ni atendas,
kun li ŝercas, kun li ludas, lin konsolas en ĉagren',
nokte de brakumoj ardas,
nian ventron rondiĝantan ni rigardas en maten'.

Tr.: K. KALOCSAY

Attila József (1905—1937) estis elstara poetfiguro de la hungara kaj ankaŭ de la monda liriko en la intermilitaj jaroj. Lia naskiĝtago, la 17-a de aprilo, estas en Hungario „la tago de la poetoj". Por ĝin festi, oni eldonas antologion el la plej belaj poemoj de la lasta jaro; ĉe librovendo poetoj dediĉas aŭtograme siajn librojn; plej bonaj aktoroj kaj poemdirantoj prezentas poemojn. — El la nun presitaj poemoj de A. J., la unua estas el lia frua periodo; en ĝi nihilisme, burĝkonsterneme elŝprucas la ribelo de subpremata, senperspektiva generacio; nur tre atentaj oreloj elaŭdas el inter la versoj spitaj ian nostalgion je bono kaj tenero. Tiu poemo rompis la filologiajn studojn de la poeto: oni forkonsilis lin el la universitato. Cetere, li murdis neniun krom sin mem: li kuŝiĝis sur la relojn antaŭ venanta trajno. La alia poemo, eĉ kun la kelke da drasteta realismo, efektas kormove per sia freŝa tono kaj kunsenta tenereco.

István Csurka:

Ŝakretisto

Dum mia ĝisnuna vivo relative tre malmulte mi iradis en antaŭhaloj de kinejoj, sed ĝuste ĉar mi neniam estis tie regula gasto, mi ĉiam havis la okulojn apertaj, kaj la kelko da duonhoroj pasigita tie valoris tiom, kiel multe da duhoroj da filmoj malbonaj. Sperto de vakuo mi povus nomi la senton, kiu kaptas min, kiam la publiko trafluas la pordojn, larĝe malfermitajn de la biletistoj, kaj restas nur la malplena vestiblego. La spektejo kvazaŭ sorbas la homojn.

Ne ekzistas absoluta vakuo: en la halo ĉiam restas kelke da hezituloj, unu larĝokule gapas al la strato — atentas la malfruantan partneron — alia kvazaŭ sen rimarko de la okazaĵoj vid-gustumas surmuran vicon da stel-fotaĵoj, dum tria simple apogas sin ĉe l'muro aŭ kolono, li ne atendas, nek moviĝas, ne konscias pri la mondo. Tiakaze oni regatas de l' sento de l' ekstereco, kaj tio estas dolora plezuro. Oni sentas sin venkita sed libera. La ena multego estas kaptitoj de klapseĝoj, la sentadon kaj pensadon la filmo direktas, dum ekstere la fantazio povas libere flirti, kaj ruliĝas la sendramaturgia filmo de la vivo, kun nedifinita artospeco.

Iam, mi eĉ ne plu scias kiam, eble ankoraŭ dum la lasta kinokonjunkturo aŭ plie ĉirkaŭ ĝia fino, post tia dekminuta, velka starado kaj pleniĝinta je la melankolia etoso de la vestiblego mi elpaŝis al la strato por serĉi ian pli aktivan pasigon de l'tempo, kaj tiam, jam ekstere sur la strato, alparolis min trista, minca junulo kun okuloj selaktecaj.

— Mi havas bileton.

Mi tute ne volis iri al kinejo, sed la junulo havis en la okuloj ian agresemon de falinto — la falinteco ĉiam estas agresema — kaj tio min aŭtomate devigis etendi manon, kvazaŭ mi volus ekzameni, ĉu la bileto konvenas. Nun estos io — mi pensis; ĉu eble nur esperis?

La bileto valoris ok forintojn, validis por la mezo, deksepa vico. Mi pene tiris dekforinton el mia poŝo, kaj tre malrapide transdonis ĝin.

— Mi ne havas monerojn.

— Ne gravas.

Mi ekiris al la stratangulo, same lante kaj kun la sama decidemo, kiel mi elpaŝis el la kineja antaŭhalo. Mi ne retrorigardis, do tute ne scias, kian mienon tiam li ekhavis, ĉu li miris, ĉu konsterniĝis, ĉu levis la ŝultrojn kaj mansvingis, sed verŝajne li reagis al mia lante pasanta dorso en unu el la menciitaj manieroj, ĉar ĵus mi ŝanĝis direkton ĉe la angulo, kiam mi eksentis brueton de postaj paŝoj kaj la sekvan momenton li paŝadis apud mi. Nun lia rigardo plenis de timo.

— La prezentado jam estas komencita — li atentigis.

— Mi scias.

— Vi ne eniros?

— Ne.

Dum unu paŝo li pripensis.

— Do ĝin redonu. Por kio do vi bezonas la bileton, se vi ne eniros? — kaj li etendis la dekforinton.

— Mia afero.

— Redonu!

Mi haltis, alrigardis lin. Lia timego frapis la okulojn. Mi ne devis esti aparte eltrovema kaj vivokona por diveni la kaŭzon.

— Vi ŝakras biletojn, ĉu? — mi atakis lin per la demando kun sufiĉa krudo kaj supereco. Li senvoĉe rigardis, timigita.

— Sed mi ne estaĉas policano — la diro videbla lin trankviligis, sed lian konjekton ne tute forigis. Rigide, kun klinita kapo li staris antaŭ mi, kaj ĉe alto de la brusto li rigardis mian veston, kvazaŭ laŭ ĝia kvalito li volus diveni, ĉu mi ne estas tamen tio, kioecon mian mi neas. Ĉar tio estis situacio absurda, mi klopodis ĝin rapide ĉesigi.

— Ĉu vi ne trinkos glason da biero?

Li levis la kapon. Ĉi tio, ŝajnas, vere lin surprizis. Li respondis nur per sensenca ŝultrolevo, kaj kiam mi ekiris, li min akompanis. Ni faris tiel kelkajn paŝojn, mi konstante atendis, ke li iamaniere petos min klarigi mian strangan kaj vere klarigendan konduton, sed li ne demandis, nur, denove kun klinita kapo, li paŝadis apud mi ŝajnante obeema. Estis mi, kiu pro tio embarasiĝis. Mi perdis la ĵusan superecon. La tuta senlerto de la situacio de mi kreita retrovenis al mi.

La celata drinkejo ne estis malproksima, sed dum la aliro ni tute ne ŝanĝis vortojn. Nur fine-feliĉe tenante la bierglasojn, unu kontraŭ al la alia ĉe la tableto de la starul-drinkejo, mi trovis ĝustecan konduton.

— Ĉu restis ĉe vi multaj biletoj?

Unue li ekridetis, poste la rideton tordis je acida grimaco:

— Naŭ.

— La filmo estas malbona?

— Mi ne scias.

— *Vi ĝin eĉ ne rigardis?*

— *Mi? Por kio?*

Nia konversacio de tiam, dum ne elĉerpiĝis la biero, estis kontinua, kaj la ŝakristo — ne plu neante, ke li estas tio — konfesis, ke ĝenerale li ne spektas la priŝakrotajn filmojn, ĉar la filmelekto estas ne lia devo, sed tiu de lia ĉefo. Mi voletis kelkajn aferojn ekscii pri tiu ĉefo kaj pri la principo de la laboro de l' bando, sed miajn ĉi-rilatajn demandojn li prirespondis per rifuza nenidiro. Finfine, jam forironta, li resumis la tuton jene:

— *Ne klopodu, majstro! Tiu ĉi negoco estas finita.*

— *Kial? Ĉu la filmoj estas malbonaj?*

— *Tute ne. Ili ĉiam egalas.*

— *Se ne, kio? Ĉu eble la televida konkurenco? — mi saĝumis, sed li superis ĉi informitecon de ĵurnalisto. Mansvingis.*

— *Pri filmoj ne plu temos. Negoco estas, kiam oni parolas pri la filmoj.*

— *Kaj nuntempe pri kio oni parolas?*

— *Kiel scii? Pri io malmulte, pri alio nemulte. Sed ne pli.*

— *Tio signifas, ke plu ne ekzistas sensacio, ĉu?*

— *Ĉu, viaopinie, ekzistas?*

Tiam li foriris de l' apogilo, do ankaŭ de mi, mi pensis, ke li eliĝos sensalute, sed li ĝisiris nur la pagejon, prenis slipon por du glasoj da biero, kaj baldaŭ ilin alportis. Demetis ilin, rigardis al miaj okuloj, nun per strikta rigardo, serioze.

— *Mi ne scias, kiu vi estas, min eĉ ne interesas tio — li diris. Sed estas certe, ke ankaŭ vi estas tia homo, kiu volus, ke io okazu. Ĉu ne?*

Mi kapjesis. La ŝakristo de biletoj daŭrigis:

— *Ne la negocon mi bedaŭras, ĉar tiun oni ĉiam trovas, eĉ multe pli bonan. Mi bedaŭras la moviĝon. Nun ne estas moviĝo, nek volo. Nun la popolo estas sen ardo, entuziasmo. Ne estas bileto? Bone, ni spektos la filmon morgaŭ. Kiel estis pli frue? Frenezuloj kun elstaraj okuloj zigzagis antaŭ la kinejoj: „Mi aĉetus bileton, bileton". Kaj ĉio estis tiel. Ĉiu volis ĉion. Kaj nun nenio urĝas. Eble morgaŭ. Poste eble.*

Per unu tiro li eltrinkis sian bieron, la malplenan glason metis sur la verdan tabloplaton.

— *Do mi, ĉu vi komprenas, ne ŝatas tion.*

Ankaŭ mi eltrinkis la bieron, kaj per gesto signis, ke nun mi foriros. Li kaptis mian manartikon.

— *Ankoraŭ ion mi dirus.*

— *Kion?*

Certe mi rigardis lin kun sufiĉe maldezira kaj konjekte rifuza mieno, kvazaŭ mi anticipe volus fermiĝi antaŭ ia malagrabla demando, ĉar li sentis sia devo min trankviligi, kaj ankaŭ la manojn balancis en la aero, por signi, ke li ne havas peton aŭ konjektindan proponon al mi.

— *Mi estas nur pita vagulaĉo, min ne valoras timi. Mi ne ŝatas labori, tio estas certa. Sed ekzemple, legi, tion mi ŝatas. Kaj ĉu vi scias, kion mi legas? Nur librojn pri la Granda Franca Revolucio, nenion pli.*

Li klin-apoĝis sin sur la tablo, tute proksimiĝis al mia vizago.

— *Saint-Just estas mia modelo.*

Mi ne kuraĝis rideti, por ne aflikti lin, mi nur kapjesis. Mi komprenas. Bone, estas nature. Kaj li rektiĝis de la tablo, kaj ekiris el la drinkejo. Ekstere ni mansalutis, prezentiĝis, sed mi ne komprenis lian, kaj li verŝajne ne mian nomon. Li ekiris denove al antaŭ la kinejo; mi prenis rektan direkton, sed post kelkaj paŝoj ne povis ne turniĝi, lin ne postrigardi. Sed tra la strato, subite homoziĝinta, tra la reciproke sin kovranta, balanciĝa pasantaro mi jam ne povis certiĝi pri lia vido, kaj pri ia fuŝpaŝulo mi decidis, ke li kaj tiu samas. Tiun mi rigardis, dum mi povis, ĝis ankaŭ li malaperis.

Tradukis: Balázs WACHA

ALDO DE GIORGI

VIAJ MANOJ

Atlasas liliopure
manetoj viaj, mia kara.
Magnoli-petale
veluras ili
laktec-opale.
Dek sveltaj serpentetoj
cignokolblankaj
fein-sorĉe enpenetras
avidan mian vidon
kaj koket-move
mian ĉemizon.
Pufetaj puras
manetoj viaj, mia kara.
Lunoklare
kaj dancistine ili eburas
nimfofare.
Prunflore ruzas
ĉi Rafaelaj
madonpreniloj,
vi min lulas kaj eluzas
per ĉi Praksitelaj
diinkaptiloj.
Perlamotohele siluetas
manetoj viaj, mia kara,
Milos-venusaj
ili galantas
saten-lotusaj.
Ĉi graciformaj papilioj
min katenis
min ensorĉas,
per ĉi feinĉarmo vi
super mia vivo torĉas.
Glimbrile fosforeskas
en lit-malhelo
manetoj viaj, mia kara:
ĵongliste, magiiste,
fantaziokapte,
ĉe amoludoj
kares-adapte.
Ho, kiel helas, belas
manetoj viaj, mia kara,
mi ilin amas.
Ho, kiel alabastre
ili diafanas.
Ambrozi-avide
mi ilin kisas
surdorse kaj surpolme,
laŭlonge la turetojn
marcipanajn,
post unu la alian,
delic-oaze,
etosas paradize
mi enekstaze.

(„Nova talento" ĉe B.K. de UEA — 1974)

Denijs Dille — foto de Gyula Holics

Vivo por Bartók

Szentendre ne estas granda urbo — ĝi estas nur urbeto en la najbareco de Budapeŝto. La loka elektra fervojo ofte trafikas inter ĝi kaj la ĉefurbo de Hungario, tamen ĉi tiu pitoreska urbeto reprezentas tute alian mondon ol la metropolo en ĝia proksimeco.

Multe da aferoj estas, kiujn oni trovas en la grandurbo, sed vane serĉas en Szentendre. La manko de unu karakterizaĵo de granda urbo estas avantaĝo — en Szentendre mankas la bruo. Ĉi tiu cirkonstanco donas taŭgan atmosferon por krea laboro. Ne estas do mirinde, ke ĝuste ĉi tie fondiĝis belarta kolonio, en kiu vivis kaj laboris multaj signifaj hungaraj pentrartistoj.

Ne nur por belartaj majstroj ĉi tiu atmosfero estas konvena: konata muziksciencisto loĝas en Szentendre de kelkaj jaroj inter siaj multnombraj libroj, muzikiloj kaj — rememoroj.

Denijs Dille — jen la nomo de la muzikologo, loĝanta en Szentendre. Li naskiĝis en Aarschot (Belgio) kaj laboris dum kelkaj jardekoj en sia patrolando kiel profesoro de la franca lingvo.

Jam frue li ekinteresiĝis pri la nuntempa muziko kaj aperigis komence mallongajn artikolojn, poste pli ampleksajn verkojn pri Debussy, Stravinski, Schönberg ktp.

En siaj pli junaj jaroj, dum liaj studoj de la moderna muzikarto, li persone konatiĝis kun Béla Bartók, la tiam jam mondfama hungara komponisto. Ekde tiu renkonto li restis en persona kontakto kun la hungara majstro; ofte ili interparoladis kaj intertenis viglan korespondadon.

En la jaro 1937. D. Dille preparis radio-koncerton en Belgio kun la persona partopreno de Béla Bartók, kiu tiam prezentis sian 2-an koncerton por fortepiano. La belga profesoro eĉ faris intervjuon kun Bartók, kio por aliaj nur malofte estis ebla. La koncerto okazis en la sekva jaro kaj Dille kalkulas de tiu tempo sian personan rilaton kun B. Bartók.

La unua frukto de la persona renkonto estis libreto kun la titolo *Béla Bartók,* verkita en flandra lingvo.

Dille tiam jam partoprenis en la pretigado de la listo de kompozicioj de Bartók kun la kunlaboro de la komponisto; la komencajn paŝojn kaj la postajn esplorojn gvidis *Bence Szabolcsi,* mondkonata hungara muzikologo.

Denijs Dille neniam estis politikema homo. Li rifuzis aliĝi al politika movado aŭ partio. Sed kiam la dua mondmilito etendiĝis ĝis sia patrolando kaj la nazia armeo okupis Belgion, li aktive partoprenis en la subtera movado kontraŭ la naziistoj. Post la milito li pro tio ne nur meritis, sed ricevis oficialajn laŭdojn kaj honorigojn de la belga ŝtato.

Dille pli kaj pli profunde studis la modernan muzikon, precipe la verkojn de Bartók. Gravajn kaj neforgeseblajn konsilon kaj fakan helpon li ricevis de *Hanns Eisler* la grandsignifa germana komponisto, kiu direktis liajn pluajn fakajn studojn kaj esplorojn.

Estis al li necese viziti Hungarion, kie Bartók dum la plejparto de sia vivo loĝis kaj laboris. En la jaro 1949. Dille faris tion: li vizitis la patrolandon de la hungara muzika geniulo. Unuan fojon li vizitis ne nur Budapeŝton, sed renkontiĝis kun gravaj personoj. Ĉie li estis bone akceptata; la registaro, la muzikartistoj, muzikologoj — ĉiuj donis al li subtenon, por ke li povu pliprofundigi siajn esplorojn koncerne Béla Bartók.

De tiu tempo Dille dediĉis tutan sian forton kaj laborkapablon al la studado kaj esplorado de la vivo kaj verkoj de Béla Bartók.

Nun sekvis tri jaroj de silenta sed intensa laboro. Kiam en la jaro 1954. Dille refoje venis en Hungarion, li sukcesis trovi amason de interesaj manuskriptoj kaj dokumentoj, leteroj ktp. de Béla Bartók, kiuj ĝis tiam ne estis konataj. Nun li sentis sia devo prilabori tiun materialon. La prilaborado daŭras eĉ en niaj tagoj.

En la jaro 1961. la registaro de Hungario komisiis Denijs Dille fondi apartan Bartók-Arĥivon. Dille entreprenis kaj organizis ĉi tiun novan instituton, kies celo estas ĉiurilate solvi problemojn pri la personeco kaj agado, verkado de Béla Bartók.

Komence la nova instituto funkciis tre simple kun 3—4 personoj, sed post nelonga tempo ĝi ekkreskis kaj pligrandiĝis.

Hodiaŭ la Bartók-Arĥivo estas parto de la poste fondita Hungara Muzikologia Instituto, en kies kadroj laboras pli ol 50 fakuloj, se ne kalkuli la ne-konstantajn kunlaborantojn.

Jen vivo, el kiu multe da tempo — jardekoj — estis dediĉataj al la esploro de vivo kaj verkoj de granda majstro de la 20-a jarcento.

Kiel mi menciis enkonduke, Denijs Dille vivas kaj laboras en silenta urbeto ne malproksime de Budapeŝto. Li neniam ĉesis labori por sia granda vivcelo.

Proksimiĝas la monato septembro, kiam estos la 30-a datreveno de la morto de Béla Bartók. La mondsignifon de ĉi tiu geniulo montras, ke ĉiam pli kaj pli da problemoj elkreskas el la ĝisnunaj kaj atendas sian solvon.

En la granda laboro de la solvado partoprenas Denijs Dille kun tuta sia forto. Antaŭ nelonge aperis nova libro de li en flandra lingvo: *Béla Bartók* (Antwerpen 1974) kaj en la eldono de la Hungara Akademio de Sciencoj ampleksa volumo — tema listo de la verkoj de Bartók, komponitaj en sia junaĝo (D. Dille: Thematisches Verzeichnis der Jugendwerke Béla Bartóks, Budapest 1974.).

Estas vere: Oni vivas, dum oni laboras. Kaj en ĉi tiu senco Denijs Dille vivas intense.

Lajos LESZNAI

Elstara patrioto kaj revoluciulo Mihály Károlyi

Skulptaĵo de Mihály Károlyi — farita de Imre Varga:

Ĵus inaŭgurita monumento ornamas ĉi tiun paĝon: ĉe la Danuba bordo apud la Parlamentejo — lia iama batalloko — leviĝas de nun la statuo de *Mihály Károlyi,* la unua prezidento de la Hungara Respubliko. Lia longa vivovojo arkis tra grandiozaj distancoj de historio kaj socio.

Naskiĝinta ĝuste antaŭ 100 jaroj en grava magnat-familio, hereda posedanto de bienego 20.000-hektara, sinsekve li iĝis espero de la popolo pelita en militon, estro de revolucio, ŝtatprezidento, distribuanto de grandbieno. Poste, alveninta al la proletaro, kiel komunisto li ĝisvivis la malvenkon de sia eksklaso aristokrata kaj partoprenis ankaŭ la novan eraon de sia popolo: la popolrespublikon.

„La fantazia fabelo de mia vivo finiĝis. La rado plenumis la tutan turnon" — li skribis mem, kiam en 1946 la nova parlamento honoris la historiajn meritojn de la hejmenveninta patrioto *per aparta leĝo,* kian honoron ricevis nur *Rákóczi* kaj *Kossuth,* iamaj estroj de la insurekcia nacio.

En la parlamento de la monarkio

La unua mondmilito ne estis ankoraŭ antaŭvidebla, kiam la grandtalenta juna grafo Károlyi iĝis parlamenta deputito de la opozicia partio „48", kiu apogis sin sur la popolamasoj havantaj tendencon anti-Habsburgan. La daŭraj akraj parlamentaj luktoj kontraŭ la ligiteco al Aŭstrio konvinkis lin, ke estas vane atendi iom ĉi-rilate de la trokonservativa registaro de grafo Tisza. La feŭdeca reĝimo montris sin surda ankaŭ al la plej gravaj sociaj problemoj. La vasthorizonta klarvido de Károlyi ebligis al li priatenti kaj konsideri la plej pezajn solvendaĵojn en la lando: la teruran situacion de la senbienaj kamparanoj, la mizeron de la kreskanta proletaro, la subpremitecon de la vasta, nehungara loĝantaro. Li komencis energie okupiĝi pri tiuj problemoj, kune kun progresema spirita elito, opone al la tuta reganta klaso.

La tutlandaj suferoj, kaŭzitaj de la I. Mondmilito, eĉ plifortigis lian kuraĝan agadon, jam ankaŭ pacifisman. Lia konsekvenca karaktero kondukis lin pli kaj pli maldekstren: meze de la milito li postulis por la popolo senrajta kaj senhava: *„rajton, panon, kaj bienon!"* Publike turnante sin tiel kontraŭ sia propra klaso de grandbienuloj, li surpaŝis vojon, kiu rekte kondukis al la laboruloj; li ekagadis lige kun la socialdemokratio, tiam eksterparlamenta, elpaŝante ankaŭ en komunaj mitingoj.

Ĉekape de la burĝa revolucio

En Oktobro de 1918 kolapsis la kaduka Habsburgreĝimo. La enŝlositaj nacioj, liberon soifante, disfaligis la Monarkion — ilin gvidis naciaj konsilioj, laŭ la modelo de la rusa revolucio. La Hungaran Nacian Konsilion Károlyi mem organizis kaj prezidis, kaj la popolamasoj farantaj la Budapeŝtan revolucion tuj aliĝis al ĝi. La demokratia revolucio rapide venkis, kaj sekvis grandiozaj eventoj, longe atenditaj demokratiaj ŝanĝoj, i.a. la okhora labortago dekretita. *Sendependa Hungarujo* naskiĝis, kies registarĉefo iĝis Károlyi, glorornamita de la popolo.

Baldaŭ estis proklamita *la Respubliko,* kaj Károlyi kiel *prezidento.* Lia anima grandeco kaj firmeco plene montriĝis, kiam li mem komencis — sur sia propra grandbieno — la bien-distribuadon, ege atenditan de la kampularo. Neforgesebla komenco en la hungara historio, kiu ricevis finon nur post kvaronjarcenta trudita paŭzo, en 1945. Sub peza ekonomia kaj internacia situacio evoluis plu la revolucia procezo, ĝis la proletaro prenis la regadon, transdonitan de Károlyi. Li solidare kaj konscie apogis la novan *Konsilian Respublikon.* Kiam la Entent-imperiismo, post plurmonata batalo, fine venkis ĝin, Károlyi elmigris eksterlanden.

En ekzilo

Dum lia longa vivperiodo kiel politika elmigrinto, Károlyi dediĉis senlacan internacian agadon por kunligi demokratiajn kaj socialismajn fortojn, kontraŭbatali reakcion kaj faŝismon. Amiko de Barbusse kaj Romain Rolland, respektata eminentulo de la Eŭropa maldekstro, li vizitis kaj studis la junan Sovet-Union, kiu forte kaptis lian socie rezoneman spiriton. Li tiris la konkludon el la historiaj eventoj: „La nova Hungarujo atendas la laborantajn klasojn por bazi la venonton, ĉar ĝi apartenos al la socialismo!" Aliĝinte al la komunista tendaro li faris nelacigeblan ĵurnalistan kaj organizan laboron en Okcidenta Eŭropo kaj Usono kontraŭ la faŝisma minaco. *Post la liberiĝo* li revenis en granda honoro, kaj maljuna, denove eklaboris por internaciaj kontaktoj de la nova Hungarujo. Mortinta antaŭ 20 jaroj, apud la tombmonumento de Lajos Kossuth li havas sian lastan ripozejon.

Ervin FENYVESI

panoramo



Ken-Ichiro Kobayashi

Krom la hejmaj ĵurnaloj ankaŭ la japanaj gazetoj raportis pri tio, ke la japana muzikestro Kobajaŝi Ken-Iĉiro, kiu en 1974 gajnis la unuan premion, okaze de internacia muzikestra konkurso en Budapeŝto, dungiĝis al la Hungara Ŝtata Koncertorkestro provizore por unu jaro. La japanaj ĵurnaloj atribuas grandan signifon al tio, ke la juna japana muzikestro kune laboras kun la fama hungara muzikestro János Ferencsik, kiu pasintjare kun granda sukceso gastrolis en Japanio.

* * *

En la mezo de julio okazos la 31-a kongreso de Internacia Stenografista kaj Tajpista Federacio (INTERSTENO), kies nuna laŭvica prezidanto estas d-ro László Barabási. Laŭ la sciiĝo el 30 landoj, pli ol 600 delegitoj alvenos. Dum la unusemajna kongreso samtempe okazos internacia konkurso kaj ankaŭ tajpista mondĉampionado en Budapeŝt. En Hungario ĉiujare en 62 tajpista kaj stenografista lernejoj kaj en 51 ekonomiaj fakmezlernejoj dekkvin mil personoj lernas, kaj ĉiu ricevas okupiĝon tuj post la ekzameno. En la fakmezlernejoj la lernantoj ricevas ankaŭ mezgradan protokolistan kvalifikon, tial la oficoj pli volonte dungas la pli alte kvalifikitajn personojn, ol tiujn, kiuj en la dujara tajpista lernejo finis la studon. Por egaligi la diferencon, la Hungara Stenografista kaj Tajpista Landa Federacio konstante organizas altgradajn kursojn kaj horojn de praktikado, kie la interesatoj povas akiri la fakan perfektiĝon bezonatan en la ĉiutaga praktiko.

* * *

En la nuna politika situacio la oleo ludas grandan rolon inter la landoj. Ĉe la fino de la pasinta jaro, György Szűcs, la direktoro de la hungara entrepreno MINERALIMPEX kaj L. D. Tkacsenko, la direktoro de la soveta entrepreno SOJUZNEVTEEXPORT faris kontrakton por la 1975-jara transporto de 6,8 milionaj tunoj da oleo al Hungario. Le ekspedo komenciĝis en januaro kaj de tiu tempo konstante okazas tra la oleodukto „Barátság" (Amikeco). El la tuta kvanto, 6 milionaj tunoj estas petrolo kaj la aliaj 800 mil-tunaj oleoproduktaĵoj estas gasoleo, benzino, hejtoleo kaj lubrikoleo. Laŭ la interkonsento, se Hungario pretendas pli da oleoproduktaĵoj ol la nuna kvanto, tiam la du entreprenoj faros kompletigan kontrakton. La soveta entrepreno faris ankaŭ kontrakton kun GDR, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Rumanio kaj Pollando por la 1975-jara ekspedo de diversaj oleo-produktaĵoj. La amika helpo de Sovetunio grandparte kontribuas, ke ne estu manko de oleo en la demokratiaj landoj.

* * *

Antaŭ dudek jaroj en 1955 oni fondis la libroeldonejon Corvina, kiu komence aperigis nur fremdlingvajn librojn. Ekde 1965 jam ankaŭ hungarlingvaj belartaj verkoj estas aperigataj grandnombre. Dum la jardekoj aperis pli ol 3000 eldonaĵoj kaj la eldonnombro estis preskaŭ 22 milionoj da ekzempleroj. Ankaŭ alilandaj libroeldonistoj aperigas librojn kunlabore kun Corvina kaj indikante tiun kunlaboradon. Nuntempe Corvina kunlaboras kun 200 libroeldonejoj el 25 landoj de la mondo. La ĝenerale konata serio de artaĵlibroj: pri popolarto, fotoarto, arkitekturo, skulptarto, pentrarto, grafiko, montrantaj la kreaĵojn de en- kaj eksterlandaj belartistoj vivantaj en diversaj epokoj, grave kontribuas al la disvastigo de la monda kulturo. Antaŭ du jaroj oni fondis la libro-klubon Corvina, kiu havas nun 2000 membrojn kaj kies membronombro konstante kreskas.

* * *

Ĉijare en la monato majo en la urbo Miskolc jam la dekkvinan fojon oni aranĝis filmfestivalon. En kvin kategorioj la konkursantoj prezentis sume 90 filmojn. Inter la filmoj estis troveblaj diversaj specoj, ekzemple dokumentaj, popularsciencaj, animaciaj filmoj. Okaze de la 30-jara datreveno de la liberiĝo de Hungario oni prezentis filmojn pri la elstaraj kreaĵoj de la pasintaj 30 jaroj. Dum la festivalo okazis kunsido de la internacia popularscienca filmfederacio (AICS). Samtempe tenis konferencon la estraro de la scienca filmfederacio de la socialismaj landoj. En tria konferenco temis pri la programoj de publika kulturo kaj pri la filmfabrikado. La prezentitajn filmojn kritikis internacia juĝistaro, kies prezidanto estis Gyula Ortutay.

* * *

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de l'mondkonata hungara romanverkisto *Mór Jókai*, la Literatura Petőfi-Muzeo en Budapeŝto aranĝis ekspozicion. Tie oni povas vidi la unuan eldonon de pli ol cent romanoj, multajn manuskriptojn, fotojn, relikvojn, la skribotablon de Jókai, liajn penikojn, farbojn, paletrojn (li amuzis sin ankaŭ per pentrado), mineral- kaj konkkolekton, multajn uz-objektojn. De la hungardevena D-ro Lajos Nagy, kiu loĝis kaj mortis apud Londono, la muzeo heredis la sigelilon de Jókai kaj multajn aliajn relikvojn.

* * *

panoramo

Antaŭ tridek jaroj la germanaj faŝistoj, krom la pontoj super Danubo, preskaŭ tute ruinigis ankaŭ la iaman reĝan palacon, la t. n. Budaburgon. De tiu tempo daŭras la rekonstruo, tamen nur la suda parto de la palaco estas preta, koste de miliardoj da forintoj. La detruitaj marmorblokoj, skulptaĵoj, lignaj kovraĵoj, orumoj, ĉiuj estas refaritaj el la originalaj valormaterialoj, laŭ malnovaj desegnoj kaj planoj, sed en moderna koncepto. De la 2-a de aprilo estas malfermita al la publiko la muzeo de Laborista Movado kaj baldaŭ la Nacia Galerio. La ĉefa celo estas, ke la Budaburga Palaco estu la akropolo de la hungara kulturo. La multekosta rekonstruo daŭras plu. Laŭ la plano ĉi tie trovos hejmon la Landa Széchenyi-Biblioteko, unu parto de la Hungara Scienca Akademio kaj aliaj kulturaj institucioj. Oni rekonstruos la Budaburgan Teatron kaj la t. n. Palacon Sándor.

* * *

En la ĉi-jara estrarkunsido de la Hungara Sciencpopulariga Asocio oni raportis pri la pasintjara aktiveco. Jen kelkaj indikoj pri la rezultoj: la nombroj de la sciencaj prelegoj estis pli ol 10 mil, en la lingvaj kursoj partoprenis 46,000 personoj, la partoprenintoj de aliaj kursoj estis 38 mil homoj. La HSA havas 38 lokajn centrojn kaj 350 lokajn grupojn. En la pasinta jaro HSA tage al 900 aranĝaĵoj sendis doktajn prelegantojn. La sekvonta celo de HSA estas pli intensa sciencpopularigo inter la industriaj kaj agraraj laboristoj.

* * *

La internacia asocio de ĵurnalistoj por la vivo de virinoj kaj familioj (AIJPF) faris estrarkunsidon en Bruselo. Laŭ la propono la Landa Asocio de Hungaraj Ĵurnalistoj, AIJPF decidis, ke en 1975, okaze de la internacia jaro de virinoj, helpe de UNESCO, en la monato junio ĝi aranĝos internacian seminarion en Budapeŝto.

* * *

Oni reorganizas en Tokio la Japanan—Hungaran Amikan Societon; kiel prezidanton oni elektis la senatoron Nabeŝima Nao-cogu kaj la ĉefsekretario iĝis Ikeda Cuneo, prezidanto de la libroeldonejo Kobunsa. En la kunsido partoprenis multaj eminentaj japanaj personoj, ĉiam movintaj antaŭen la amikecon inter la du landoj kaj helpintaj la popularigon de la hungara kulturo. Aparta komitato formiĝis por tiuj festoj, kiujn la societo aranĝos okaze de la 30-jara datreveno de la liberiĝo de Hungario. En Tokio la ambasadoro de Hungara Popolrespubliko Ernő Horváth transdonis la memormedalon de la Institucio de Kulturaj Interrilatoj al la ekssekretario de la societo Vada Tošijaki.

* * *



Desegnaĵo de Mihály Zichy, malkovrita en Gruzio

En 1977 estos la 150a datreveno de la naskiĝo de l'fama pentristo kaj ilustristo *Mihály Zichy* (1827—1906). Li naskiĝis en malgranda vilaĝo apud Balatono, lernis pentrarton kaj grafikon en Peŝto ĉe la majstro Marastoni, poste, en 1844, li fariĝis disĉiplo de Ferdinand Waldmüller en Vieno. En 1847 la rusa granddukino Helena invitis lin al Petersburgo (Leningrad) kaj tie la caro en 1856 nomumis lin kortega pentristo. Ĝis 1874 li vivis en Petersburgo, tiam li iris al Parizo kaj en 1879 li venis hejmen. Tiam en sia naskloko, en la vilago Zala, li konstruigis artlaborejon grandegan kiel templo. Li volis dediĉi sian talenton al sia patrio, sed li ricevis nek aprecon, nek subtenon, kaj tial reiris al Petersburgo kaj nur de tempo al tempo revenis al la naskvilaĝo por tie labori. La morto lin trafis en Petersburgo. La tiama ŝtato portigis liajn restaĵojn hejmen kaj lin enterigis grandceremonie, sed poste forgesis pri li. Zichy eminentis precipe kiel ilustristo de la verkoj de Shakespeare, Goethe, Petőfi, Madách, Arany, Puŝkin, Lermontov kaj Gogol; la unuan eldonon de la E-a „La tragedio de l'homo" ornamas reprodukto de liaj 20 desegnaĵoj. En Zala, en la gandega ateliero, preskaŭ 70 jarojn kuŝis sub polvo liaj pentraĵoj, skizoj kaj personaj uz-objektoj. Nun la hungara Kultura Ministerio kun la departementa konsilio komencas per signifa financa kontribuo ĝin restaŭri por fari el ĝi Muzeon de Zichy.

* * *

10 milionoj da homoj loĝas en Hungario. Laŭ la deklaro de la Kultura Ministerio pasintjare 10 milionoj da homoj vizitis la hungarajn muzeojn. Kompreneble, suĉinfanoj kaj kadukuloj restis hejme, sed aliuloj vizitadis ankaŭ plurfoje. La kaŭzo de la granda interesiĝo estas, ke la ŝtato konstante zorgas pri la aĉetado de novaj artobjektoj, pri la estigo de novaj muzeoj kaj pri la restarigo de antikvaj konstruaĵoj.

La Mondasocio de Hungaroj akceptis multajn gastojn okaze de la 30-a datreveno de nia liberiĝo. La hungaraj gastoj venis el diversaj landoj: el la Hungara Societo de New York, el la Hungara Klubo de Milano, el la Hungara Unuiĝo de Parizo, el la Laboristhejmo de Los Angeles, el Aŭstrio, el Belgio.

La interesiĝo pri nia patrujo ĉiam kreskas; la nombro de hungaroj vivantaj en eksterlando, kiuj vizitas la ekspatrujon, de jaro al jaro altiĝas. La vizitantoj povas ekkoni la nuntempan vivon de Hungario, la rezultojn atingitajn dum la konstruo de la socialismo. La spertojn kolektitajn ili transdonos al la aliaj hungaroj, restintaj eksterlande. Krome, dum la vizito ĉiuj havas eblecon praktiki la gepatran lingvon.

Komp. kaj trad. Szilárd BÁLINT



D-ro Ferenc László

Konstanta Danub-ekspozicio en la Budapeŝta Citadelo sur la monto Gellérthegy

En la ekonomia kaj kultura evoluo de la popoloj havis ĉiam decidan rolon la konkretaĵoj de la naturo, inter ili unuavice la hidrografiaj faktoroj. La homo ekloĝis apud la akvo kaj liaj loksidejoj kreskis grandaj borde de la akvo.

Urboj kaj vilaĝoj viciĝas laŭlonge de la riveroj kiel perloj. Bonŝanca estas ĉiu loksidejo, kiu vivas en bona amikeco kun sia rivero.

Parizo konstruiĝis sur la bordo de Sejno, Berlino apud Spree, Moskvo borde de la rivero Moskva, Budapeŝto, Vieno kaj Beogrado sur la bordo de Danubo, London ĉe Tamizo — kaj la vico estas daŭrigebla ĝis senfineco.

La riveroj transformis la pejzaĝon, la valojn, elformis ebenaĵojn kaj per tio samtempe difinis la vojojn, kiujn la ekloĝontoj devis sekvi. La rivero ŝirmis la loksidejojn, faris ilin neatakeblaj almenaŭ de unu flanko, provizis per akvo la foson, kiu zonis la loksidejon kaj havis la taskon haltigi la malamikon. La akvo altiris ankaŭ la industrion: la tanistojn, la bluigistojn,* la forĝistojn de la malnovaj tempoj, same kiel nuntempe la fandofornojn, kemiajn uzinojn, paperfabrikojn ktp. La rivero estis vojo de trafiko, brut-trinkejo, loko de vestolavado, banejo, dogan-limo ... La rivero montris sin utila el multaj vidpunktoj. De ĝi dependis la ekzisto de multenombraj loksidejoj.

Ĉio ĉi estas rilatigebla ankaŭ al Danubo, kiu estis ĉiam grava faktoro en la ekonomia-socio evoluo de la popoloj vivantaj apud ĝi. Tion ĉi spegulas la ekspozicio, kiun oni malfermis la 6-an de decembro 1974 en la Budapeŝta Citadelo sur la Gellérthegy (Monto Gerarda).

* Bluigisto: *metiisto koloriganta tolon plene blua, aŭ provizanta ĝin per bluaj ornamoj helpe de farbo farita el certaj plantoj.*

La montrofenestroj de la ekspozicio en la interna korto de la Citadelo





La Budapeŝta ponto Libereco, eksplodigita en la dua mondmilito kaj rekonstruita post la milito

La materialo de la Danub-ekspozicio bone demonstras interalie, ke Danubo estas ja primare la naskito de la naturo, sed tiun praan Danubon la krea talento de la homo aliigis kaj transformis dum ĉirkaŭ 2 jarmiloj. Per la laboro de la teknikaj fakuloj, inĝenieroj kaj laboristoj de la popoloj ĉi tie eklo-ĝintaj, Danubo fariĝis la komuna kreaĵo de la naturo kaj de la homo. Per la multflanka utiligeblo de sia akvo Danubo interligas la popolojn ĉi tie loĝantajn, ilian ekonomion, komercon, kulturon. La reciprokaj interrilatoj plifortigas kaj helpas tiujn popolojn levi sian vivon sur pli altan nivelon. Jen, kiel plifirmiĝas la konscio de la ĉi tie loĝantaj nacioj pri amikeco kaj kunaparteno.

Katenante esprimas tiun penson la granda hungara poeto Attila József per la ĉi-suba strofo de sia poemo „Ĉe Danubo":

Paseo, nuno kaj futur' kuniĝas
en ondoj de Danub' interbrakumaj.
Praulajn luktojn fandas nun intime
en pacon la memoro remigranta.
Niajn aferojn kunajn ordi fine,
jen nia tasko, kaj eĉ ne malgranda.

Vere ne estas malmulta la laboro, kiu atendas la popolojn de la apud-Danubaj landoj koncerne la racian profitigon de la valoroj de la rivero. Tiujn taskojn oni povas solvi kun rezulto nur per akordigita agado kaj komuna fortostreĉo de la respektivaj landoj. Senrezerve oni povas konstati, ke la valoroj de Danubo servas ne nur la regionojn rekte tuŝatajn, sed ankaŭ la universalajn interesojn kaj ekonomian prosperadon de la Eŭropaj popoloj.

Tiuj interesoj estas grupigeblaj laŭ la subaj temoj:

— industrio-lokado,
— navigado,
— ŝirmado kontraŭ inundo, riverreguligo,
— produktado de elektra energio,
— provizado per industria akvo kaj trinkakvo,
— protektado de la bona kvalito de la akvo,
— irigacio,
— forkondukado de la surkampaj akvoj (internaj akvoj),
— ripozumo,* sporto

Laŭ la planoj, la materialo de la Konstanta Danub-ekspozicio en sia definitiva formo ampleksos ĉiujn supraj temojn kaj inkluzivos kompreneble ankaŭ la ekspon-materialon de la respektivaj landoj. La materialo de la unua fazo enhavas jam la sekvantajn:

Niĉo I.:

De pli ol du milionoj da jaroj Danubo trafluegas 2860 kilometrojn longe ĉi pejzaĝon, formante ekde la pratempoj naturan interligan vojon inter la bordoj de la Nigra Maro kaj Mez-Eŭropo. Sur ĝiaj bordoj la fosilo de la arkeologo, en ĝia fluejo la skrapoŝipo kaj la subakva arkeologio malkaŝadas multenombrajn memoraĵojn de la popoloj ekloĝintaj ĉi tie alterne unuj post la aliaj.

La 2860 km-ojn longa akvovojo estas unu el la ĉefaj vojlinioj de kaj la antikva-epoka kaj la plejnova-epoka komerco. La Grekoj nomis ĝin Ister, la romianoj — Danuvius. Dio Danuvius gardis la „limes" de la gubernio Pannonia de la romia imperio.

Niĉo II.:

Ekde pratempoj la loksidejoj elformiĝis apud riveraj transirejoj. Pasis la tempo, kaj la vadejojn ŝanĝis boatoj, pramoj, pontoj — flospontoj kaj firmaj pontoj. La romianoj konstruis flospontojn, lignopontojn kaj volbohavajn ŝtonpontojn sur Danubo. En la 19a jc. ankoraŭ staris la romiana volba ŝtonponto ĉe vilaĝo Mehádia. La romianoj konstruis do la unuan konstantan ŝtonponton. En la mezepoko la varhonoj (avaroj), hungaroj, turkoj kaj aŭstroj estigis multajn flospontojn sur la rivero. La unua ŝtalponto — nomata Ĉenponto — ekde 1849 superarkis Danubon inter Buda kaj Peŝt. La transirejoj de la rivero estis samtempe ankaŭ la transiraj lokoj de komercaj kaj militaj vojoj. Ŝipo- kaj akvomuelejoj dum jarcentoj muelis grenon kaj produktis energion por la industria evoluo.

Niĉo III.:

Post la militoj kontraŭ la turkoj unu el la plej ardaj problemoj de la rekonsciiĝanta Danub-valo estis la reguligo de la sovaĝiĝintaj akvoj kaj la klopodoj igi uzeblaj la akvovojojn. En la unua duono de la 19a jc., sub la gvido de la tiama Konstruada Ĉefdirekcio, elstaraj inĝenieroj de la epoko faris la preparan, primezuran kaj kartografian laborojn de la Danub-reguligo, la t.n. Danub-mapadon. La Akvoafera kaj Navigada Sekcio de tiu Ĉefdirekcio fondis la organizitan akv-aferan servon. La plej gravaj taskoj de la moderna

---

* *ripozumo: bv. rigardi piednoton en HV 6/74, pĝ. 20.*

akvomastrumado pri Danubo estas la inundo-ŝirmado, la riverreguligo, la utiligo de la akvo kaj protektado de ĝia bona kvalito, la zorgado pri la pureco de la fluejo, la signado kaj konservado de la sekura ŝipvojo.

Niĉo IV.:

La nereguliteco de la Malsupra Danubo,* la rokoklifoj de Vaskapu** jam de pratempoj endanĝerigis la navigadon. Jam la romianoj provis ĝin kanalizi. En la unua duono de la 19a jc. István Széchenyi rekonis la komunan intereson de la popoloj de la Danub-baseno. Li venkis la kontraŭstaron de la registaro, akiris la kunlaboron de la serba kaj rumana regnestroj, kaj inter 1833 kaj 1835 li komencis — sub la gvido de inĝeniero Pál Vásárhelyi — la reguligon de Vaskapu, kaj malfermis ankaŭ por vaporŝipado la orientan pordegon de Danubo. Lian verkon finis nur la postsekva generacio inter 1892—1896, akompanate de internacia interesiĝo kaj rekono.

Niĉo V.:

Dum la multe-dekmiljara evoluo de la surakva veturado, la homo — helpe de siaj ŝtonepokaj laboriloj kaj per la elbruliga metodo — kreis sian unuan akvan veturilon: boaton ellaboritan el sola arbotrunko. Sur Danubo tiu estis konata ĝis fine de la 19a jc.

La romiaj ŝipoj jam estis ripohavaj, tabultegitaj ŝipoj. Sur tomboŝtono el la 3a jc., trovita en Carnuntum apud Danubo, ni renkontas la unuan fojon la desegnon de grenlivera ŝipo kun spiralforma nazo. Tiu tipo fariĝis poste ĝenerala sub la nomo „violonego-ŝipo".

La mezepokaj hungaraj ŝalupoj kaj pramoj memorigas pri la romiaj ŝipoj. La turkoj enkondukis — laŭ reduktitaj mezuroj — siajn marajn velajn karavelojn kaj ŝarĝgalerojn. La maniero de la kontraŭflua navigado estis ĉiam trenado per la forto de homaj muskoloj.

Niĉo VI.:

Sur Danubo la vaporŝipo aperis la unuan fojon en 1817. Ĝia nomo estis „Carolina", ĝia konstruinto estis Antal Bernhardt el la urbo Pécs. La cirkonstancoj ne favoris la entreprenon. Kvankam teknike sukcesa, ekonomie ĝi ruiniĝis.

En 1829 fondiĝis la unua, la Imperiestra kaj Reĝa Patentita Societo de Danuba Vaporŝipado (DGT—DDSG), kiu en 1830 lanĉis sian unuan vaporŝipon, la „FRANZ I". La grandenergia organizanto kaj disvolvanto de la Danuba vaporŝipado estis István Széchenyi. Al li estas ŝuldebla la estigo de la unua sistema ŝiplinio ekde Vieno ĝis la Nigra Maro. Li fondis ankaŭ la plej grandan apud-Danuban ŝipfabrikon de la 19a jc., la Ŝipfabrikon de Óbuda. La monopolan situacion de DDSG ĉesigis la Pariza interkonsento en 1856 kaj tiu en Berlino en 1878, deklarante la liberan ŝipadon sur Danubo. Nur post tio povis fondiĝi kelkaj enlandaj entreprenoj, kaj pli poste, je ŝtata iniciato, la Navigada Entrepreno de MÁV (Hungaraj Ŝtataj Fervojoj). El ĝi naskiĝis en 1894 la unua signifa Budapeŝta navigada entrepreno, la Hungara Akcia Kompanio de River- kaj Marnavigado (MFTR), la jura antaŭulo de la hodiaŭa MHRT.

Ŝtuparo ĉe la Budapeŝta Danub-kajo

Niĉo VII.:

La dua mondmilito grave damaĝis la Danuban navigadon, parto de la ŝiparo pereis. La min-blokadoj kaj sinkintaj ŝiporuboj dum jaroj endanĝerigis la navigadon. La militaj okazaĵoj paralizis ankaŭ la akvoaferan servon. La reorganizon de la hungara navigado komencis en 1946 la Hungara-Soveta Akcia Kompanio de Navigado kaj ekde 1954 la navigadon direktas la Hungara Akcia Kompanio de Navigado. Dum la pasintaj 20 jaroj renaskiĝis ankaŭ nia Danuba-mara navigado.

La akvomastrumajn taskojn kune kun la konservado de la akvovojo kaj de la traceado* de la ŝipovojo plenumas reorganizita moderna akvoafera servo sub la gvido de la Tutlanda Akvoafera Instanco.

Pri la substituado de la ekstempiĝintaj kaj eltrafikitaj ŝipoj zorgas pluraj hungaraj ŝipfarejoj kuniĝintaj en unueca organizo nomata Hungara Ŝipo- kaj Gruofabriko. Ili produktas ankaŭ por eksporto.

Niĉo VIII.:

Nuntempe 8 nacioj vivas borde de Danubo kaj 25 popoloj navigas sur ĝi. Ĝian internacian uzadon oni reguligis plurfoje en la pasintaj cent dudek jaroj. Laste en 1948 per la Beograda Konvencio, kiu certigas por ĉiu popolo la rajton de libera navigado. La principa direktanto de la Danuba

---

* *Malsupra Danubo: sekcio de Danubo ĉ. ekde la suda limo de Hungario ĝis la maro.*

** *Vaskapu: (Fera Pordego), efektive kolosa rokopordego, kiun la rivero batis por si dum jarmilionoj tra la ĉenego de la Sudaj Karpatoj.*

* *tracei: marki la vetureblan ŝipovojon per diversaj signiloj (buoj ktp.)*

Lukto kontraŭ la mazuto-malpurajo

internacia navigado estas la Danub-komitato rezidanta en Budapeŝto kaj kunmetita el la senditoj de la apud-Danubaj ŝtatoj.

Koncerne la estontecon de Danubo estas tre grava la konstruata Danubo-Majno-Rejno-kanalo. La kuraĝa entrepreno de Ödön Széchenyi tiris la ĝeneralan atenton al la Danubo-Majno-kanalo, kies konstruadon provis jam Karlo la Granda en 793 kaj realigis Ludoviko, la bavara reĝo, inter 1837—1846. En 1867 per sia malgranda vaporŝipo, la „Marvirineto", Ödön Széchenyi ekveturis okcidenten, la unua li tranavigis la kanalon, poste sur Rejno kaj francaj enlandaj akvoj li atingis Parizon por viziti la tiean mondekspozicion. La „Rhein-Main-Donau Aktiengesellschaft" komencis la konstruon de la necesaj akvonodoj kaj kanalo.

Jugoslavio kaj Rumanio ekfunkciigis en 1972 la akvonodon ĉe la Ferpordego, dum Aŭstrio de 1950 daŭre konstruas la Danubajn akvonodojn. Ankaŭ nia lando komencis la preparlaborojn de la akvonodoj konstruotaj kune kun Ĉeĥoslovakio.

La ekspozicion malfermis Miklós Breinich, la unua vicprezidanto de la Tutlanda Akvoafero Instanco per la ĉi-suba festparolado:

Estimata festanta publiko, karaj gastoj!

Danubo estas la plej internacia rivero de la mondo. Sur nia Tero ne troviĝas eĉ unu alia rivero, kies akvokolekta teritorio estas distribuita inter 8 landoj, kaj apud kies bordo vivas 8 popoloj.

La nobla celo de la kreintoj kaj organizintoj de tiu ĉi ekspozicio estis prezenti — eĉ se nur tre skize

kaj fragmente — la memoraĵojn de la historia pasinteco de la apud-Danubaj popoloj kaj samtempe la rolon kaj signifon de Danubo vidpunkte de la amikeco kaj kunlaboro de la popoloj. La ilustraĵoj de la ekspozicio ĵetas lumon sur kelkajn karakterizajn epokojn de la multmiljara vivo de Danubo kaj prilumas plurajn eventojn decidajn en la sorto de la apud-Danubaj popoloj.

La trovaĵoj el la bronza kaj fera epokoj informas nin pri la postsignoj de la prahoma kulturo, dum la bildserioj prezentantaj la romian epokon montras jam la unuan veran brilepokon de Danubo. La konstruadoj iniciatitaj de imperiestroj Tiberio kaj Trajano eĉ el la malproksimo de dumil jaroj vekas admiron en la homo de l'hodiaŭo.

Post la tempestaj jarcentoj de la popolmigrado ni jam havas memoraĵon pri tio, ke en la 12a—13a jc. sur Danubo jam navigis gildoj, liverante pasaĝerojn kaj akvon. Por evoluigi la Danuban komercon, la hungara reĝo Lajos la Granda en 1351 abolis la impostpagon por ŝipoj veturantaj laŭlonge sur Danubo, rekonante per tio la liberan navigadon.

En la florepoko de la feŭdalismo Danubo estas jam unu el la arterioj de la Eŭropa komerco. Ekprosperas la komercistaj urboj, floras la metiista industrio kaj la gildoj.

La 17a kaj 18a jc. estas la jarcentoj de la militoj en la historio de la Danubregiono. La turkaj armeoj okupis la urbon Buda kaj sieĝas Vienon. Iliaj ŝipoj navigas sur Danubo.

La kapitalismo kaj la industria revolucio alportas denove evoluon. La tiam estiĝantan Danuban priakvan vivon karakterizas, ke jam antaŭ ducent jaroj, en la 1770-aj jaroj, oni organizis la Navigacian Oficejon de Peŝt, kies rezideja konstruaĵo staris verŝajne sur la hodiaŭa placo Vigado.

La grandaj konstruadoj de la reformepoko, la grandvolumenaj laboradoj direktataj de Széchenyi kaj Vásárhelyi metas la bazon por la pliampleksigo de la navigado. En 1817 Antal Bernhardt konstruas la unuan Danuban vaporŝipon kaj en 1829 fondiĝas la Unua Societo de Danuba Vaporŝipado, DDSG. Konekse kun la evoluo de la navigado disvolviĝas ankaŭ la ŝipkonstrua industrio, unue en la urbo Komárom, poste sur la insulo de Óbuda. La 1-an de januaro 1895 oni fondas la Hungaran Akcian Kompanion de River- kaj Marnavigado, la antaŭulon de MAHART kaj la akva trafiko seninterrompe evoluas.

La sangoŝtormo de la dua mondmilito provizore paralizas ankaŭ la vivon de Danubo. Sed post la liberiĝo rapide disvolviĝas la rekonstruado. La apud-Danubaj landoj en 1948 subskribas la Belgradan Konvencion, kiu certigas por ĉiu popolo la liberan navigadon, kaj oni fondas la Danub-komitaton, kiu zorgas pri la evoluigo kaj utiligo de la akvovojo.

Sur la lasta ekspon-tabulo aperas antaŭ ni la estonteco de Danubo. Sekve de la scienca-teknika

Spiral-naza grenlivera ŝipo (violonego-ŝipo)

revolucio ankaŭ en la apud-Danubaj landoj plirapidiĝas la ekonomia evoluo kaj en eksterordinara mezuro vastiĝas la internaciskala distribuo de la laboro. Rezulte de tio multobliĝas la signifo de Danubo. En la estonteco tiu teritorio estos pli konkuripova, kiu disponas pri pli moderna akvovojo. Tiu akvovojo devos esti taŭga por liveri varon malkare kaj en granda amaso, kontribuante per tio al la favora aliiĝo de la produkto-strukturo de la respektivaj landoj kaj helpante la plirapidiĝon de la kresko de ilia ekonomio. La kompleksa utiligo de la regulita Danubo metas samtempe en frontan pozicion la energi-produktadon, la sekuran proviza-

Interdiga inunda teritorio





River-reguladaj objektoj ĉe la Danubo

don de la industrio, agrikulturo kaj loĝantaro per akvo kaj la evoluon de la turismo.

Ĉio ĉi estas realigebla nur per granddimensiaj laboroj. Ĉiu lando okupiĝas pri estigo de akvonodosistemoj, kiuj ebligos la fruktuzon de la avantaĝoj gajneblaj el la kompleksa profitigo de la rivero.

Konsiderinde grava estos la ekfunkciigo de la Danubo—Majno—Rejno-kanalo, antaŭvidata en la komenco de la 1980-aj jaroj. Per tio iĝos interligitaj la akvosistemoj de Danubo kaj Rejno kaj kreiĝos rekta akvovojo inter la plej gravaj industriaj teritorioj de Okcidenta, Meza kaj Orienta Eŭropo.

La 3500-km-a akvovojo-sistemo, kies geografia centro estas nia ĉefurbo, fariĝos la spino de la unueca Eŭropa akvovojo-reto kaj ebligos la elformadon de pliaj interligoj, inter ili la realigon de la kanaloj Danubo—Elbo—Odera kaj Danubo—Tiso.

Estimata Festanta Publiko!

La evoluigo de Danubo konsiderinde kontribuas al la socia-ekonomia evoluo de ĉiuj ŝtatoj troviĝantaj sur ĝia bordo. Sed la evoluigo estas efektivigebla nur, se ni faras ĝin kunordige, en internacia kunlaboro. Ankaŭ tiu ĉi konstanta ekspozicio simbolu la amikecon kaj kunagadon de la popoloj. Ĉion ĉi ni povas prezenti provizore nur inter tre modestaj kadroj kaj ebloj, sed nia celo estas krei per tio la kondiĉojn por la estigo de internacia Danubo-muzeo.

Antaŭ ol fini, mi volus danki por la iniciato de la navigacia subkomitato de la Hungara Scienca Akademio kaj por la morala kaj materiala apogo de ĉiuj organizoj, kiuj ebligis la estigon de la ekspozicio kaj ne lastavice por la entuziasma, sindona kaj rezultoplena laboro de la senperaj organizintoj kaj kreintoj.

Sur tiu ĉi belega punkto de nia ĉefurbo mi malfermas la konstantan Danub-ekspozicion kun la deziro, ke la vizitantoj de la ekspozicio — kaj enlandaj kaj eksterlandaj — en kiel eble plej granda nombro ekkonu la pasintecon, la nuntempon kaj la grandiozan estontecon de nia komuna historia rivero, kaj plifirmigu ankaŭ per tio la amikecon de la popoloj vivantaj sur ĝiaj bordoj.

Trad.: Tibor ÚJLAKY-NAGY

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

MEDICINA HEROLDO, aperinta en Belo Horizonte, Brazilo estas kuraĝa iniciato: ĝi volas esti la organo de la Brazila Esperantista Kuracista Rondo, fondita de D-ro Hélio F. Aderne. En la antaŭparolo la redakcio emfazas, ke M.H. ne intencas konkurenci kun la medicina revuo de UMEA, aperanta en Japanio. El la artikoloj de la revuo mi legis kun intereso tiun de C. L. MELO: „Kial tumoro kreskas?", valoran resumon de la plej lastaj medicinaj esploroj ĉi-koncernaj kun 57 referencoj. Kompreneble mi, kiel laiko, ne komprenis ĉiudetale la artikolon, sed malgraŭ mankoj de kompreno mi tamen ricevis impreson pri tiu grandega laboro, per kiu la hodiaŭa medicino volas malkovri la sekreton de la kancero kaj ekstermi ĉi tiun malamikon de la homo. Alia interesa artikolo estas „La psikosocia paciento"; ĝian aŭtoron, R.P. NOGUEIRA, mi sukcesis identigi kun la konata poeto, kies poemlibro „Vojo kaj vorto" aperis ĉe Stafeto en 1972. Ofte oni emfazas la gravecon de tio, ke en E-o kreiĝu teknika-scienca literaturo, kaj mi opinias, ke el ĉiuj branĉoj de la scienco la medicino havas la plej bonan ŝancon por esti kultivata, ĉar ĝi estas aŭ povas esti la plej komun-interesa. Jen kial mi okupiĝis tiel vaste pri M. H., al kiu mi deziras multajn pluajn numerojn post la unua.

LA TAMTAMO, organo de la Jokohama Esperantista, Rondo, estas plejparte japanlingva, nur ĝia gvidartikolo anoncas esperantlingve, ke la Rondo sendis protestleteron al la Pacpremia Komitato de la Nobel-premio, ĉar tiu distingis la eksĉefministron Sato per la pacpremio. Nome, la membro de la Jokohama Rondo estis tiu esperantisto Jui Ĉunoŝin, kiu antaŭ sep jaroj sinofere bruligis sin proteste pro la militarisma politiko de la pacpremiito Sato. La Rondo ĝis nun ne ricevis respondon de la Nobel-premia packomitato kaj tion mi bone komprenas, ĉar respondi ĝin vere estus malfacilege.

El la BULGARA ESPERANTISTO (N-ro 12.) mi ellevas la artikolon de VIOLIN OLJANOV, kiu okupiĝas pri kelkaj metodikaj demandoj de la Esperanto-instruado. Ĝi enhavas tre observindajn konsilojn. — Kore mi salutis la poemon „Erinaco" de L. JEVSEJEVA: ĉarmaj versoj por infanoj kun ĉarma melodio de IRINA BELIVANOVA. Kaj sur la kvara paĝo mi trovis la portreton de nia ĉefredaktoro MIHÁLY GERGELY, okaze de tio, ke la gazeto publikigas lian novelon „Soleca telefonulo".

En DIA REGNO mi trovis vastan trikolumnan recenzon de H. A. de HOOG pri la esea libro „Ni kaj Ĝi" de G. WARINGHIEN. Sincerdire, mi atendis akran atakon kontraŭ la libro, despli agrable min tuŝis la toleremo de la recenzisto. Li eĉ montras ŝajne malŝateton al tiuj, „kiuj pensas, ke per la kredkonfesoj de antaŭaj jarcentoj aŭ miljare malnovaj konciliaj decidoj la lasta vorto estas dirita". Sed ankaŭ tiujn li ne ŝatas, kiuj, disŝirinte la reton de religiaj dogmoj „falas en la reton de la pli rigidaj marksismaj dogmoj". Ĉi lasta diro min mirigis, ĉar la vera marksismo estas la sendogmeco mem. La recenzisto diras al Waringhien: „la kristanismo ne katenis, sed liberigis, malgraŭ la ofta ŝajno de la kontraŭo". Mi diras al de HOOG: „La marksismo ne katenis, sed liberigis, malgraŭ la kelkfoja ŝajno de la kontraŭo".

KOMUNA ESPERANTO GAZETO estis plurfoje laŭdata de mi, fakte ĝi apartenas al tiuj naciaj E-gazetoj, kiuj indas esti konsiderataj serioze. Nun (1975, n-ro 2.) mi trovis en ĝi artikolon anoniman: „Penseroj pri nia literaturo". La aŭtoro trarigardas nian literaturon originalan kaj tradukitan kaj kondamnas ĝin neleginda, indulgante nur la tri romanojn: „La Faraono" de Prus, „Cezaro" de Jeluŝiĉ kaj „Mr. Tot aĉetas mil okulojn" de Forge. Poste li okupiĝas pri la demando, kiajn verkojn oni devus eldoni kaj konkludas, ke ni bezonas detektiv-romanojn. Hm. Principe mi ne estas malamiko de krimi-storioj, (Waringhien tiel bele defendas ilin en siaj Eseoj I.), tamen la aŭtoro devus pripensi: 1.) ke la seriozon de nia literaturo kompromitus, se ĝi konsistus el *nuraj* detektiv-romanoj; 2.) ke la bonaj detektiv-romanoj estas la plej tradukataj pecoj de la leĝera literaturo, do la komencanta esperantisto legos romanon ekzemple da Agatha Christie prefere en sia lingvo ol Esperante. Pri Shakespeare la aŭtoro skribas, ke li „ne interesas min, kiu vivas 300 jarojn poste, la enhavo de liaj dramoj estas grandparte enuiga kaj supraĵa, ofte stranga, kiel multaj antikvaj dramoj". Je tia kurioza opinio mi povas nur demandi, kial tiu enuiga aŭtoro vivas eĉ nun post 350 jaroj sur la scenejo de la mondo; kial eĉ nun estas la revo de aktoroj ludi la rolon de Hamlet, aŭ Lear, aŭ Othello, aŭ Romeo? Se oni volas nomi la kulminojn de la eŭropa literaturo, unuamomente tri granduloj venas en la kapon: Dante, Shakespeare, Goethe. Kaj el la tri, Shakespeare estas la plej vivanta. Por lin subtaksi oni devas esti minimume Tolstoj.

En SENNACIULO ((11,74) aperis recenzo pri la „Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto". Kvankam la recenzanto ne ĉion en ĝi trovas ĝusta, kelkon eĉ trovas „ŝoka", tamen li asertas, ke la libro „signos epokon en la historio de E-o". Kurioze, ke en la gazeto mi neniam legis tiel grandajn epitetojn pri la Plena Gramatiko de K.K. kaj G.W. — La n-ro 3. (1975) salutinde publikigas leteron de Engels al Starkenburg (1894), kiu forigas la miskomprenojn kaj misklarigojn pri la rigida ekonomiismo de la marksismo. „Eĥoj el Usono" estas verkita konfuze kaj senkohere. La artikol-verkinto esperas la malhelpon de la memdetruo de l' homaro per nukleaj armoj — imagu! — helpe de la Multnaciaj Korporacioj, „kiuj internacie maksimumigas profiton". La graslitera subtitolo „Internacia Jaro por virinaj *ratoj*" estas inda esti eternigita en la klasika libro de la preseraroj.

William Auld:

Rossetti – „fajra forto"

Reto Rossetti estis siatempe la vera patro de la Skota Skolo, laŭ tiu senco, ke nur li el la Kvaropo spertiĝis en pli frua generacio de esperantistoj kaj jam posedis la ampleksan kulturon de nia lingvo. Sian tutan sperton li malavare disponigis al la novicaj skotaj talentoj, kaj edukadis kaj kuraĝigis ilin, ne nur dum ilia esperantista „infanaĝo", sed ankaŭ longe post ilia lingva maturiĝo. Per sia entuziasmo kaj per sia neimiteble viglega konversacia lingvaĵo li stimulis siajn junajn amikojn, kaj estis modelo, kiun ili vane penadis kopii. Kiu ne aŭdis lin paroli, tiu povas ricevi relative palan impreson per legado de lia proza stilo. (Aktuale li presigas en „Heroldo" serion de artikoloj pri la prozaj stilistoj de Esperanto; sed bedaŭrinde lia modesteco nepre malebligos al li pritrakti la plej elstaran el ĉiuj: lin mem.)

Kiel poeto li debutis jam en 1930 (kiam li aĝis ne pli ol 21 jarojn); en *Literatura Mondo* liaj verkoj ekaperis, se mi ĝuste memoras, en 1935; kaj jam antaŭ la mondmilito lia nomo aperis sur la kovrilo de tiu elita revuo kiel konstanta kunlaboranto. Ankaŭ en la unua postmilita kajero de LM troviĝis unu lia poemo — kiu ardigis por la lingvo min, kelkmonatan kulturbebon. Koincide kaj reciproke, baldaŭ poste aperis mia unua traduko en *Esperanto en Skotlando*, kaj tiu traduko — multe, multe super mia ordinara tiama nivelo — allogis Rossetti'n al mia dompordo; tiel ni konatiĝis, kaj tiel naskiĝis — pli bone: koncipiĝis — la Skota Skolo.

Kvankam poemojn li verkis tute seriozajn, kies majesta belo povas nur ravi — kiel *La vivomaro, Ŝipo sur la rokoj, La stumpaj arboj* — tamen unu tre grava karakterizo de lia verkaro estas ankaŭ la sprito, kaj multaj spritaĵoj liaj iĝis kvazaŭ klasikaj; el la *Saluto al la novnaskita fileto de K.R.C. Sturmer:*

Ni do ĝoju pri la frukto,
kiu Sturmer-hejmon benis:
indas tiu ĉi rezulto,
ĉar li longe penis-penis!

Aŭ la tuto de tiu satira *Edzo kaj fraŭlo,* kies parteto tekstas ekz-e:

Fraŭlo sponte celas
al distroj kaj amikoj;
edzon malakcelas
famili-implikoj.
Kaj dum la fraŭl' rikoltas
ĉe kolegaro saĝon,
la edzo nur aŭskultas
la najbarin-novaĵon!

Aŭ la multnombraj vortludoj de tiu lia fikcia kreaĵo, Profesoro Klapelkap (espereble vi kaptas la aludon: Mankas klapo en lia kapo):

Sed ve, la ŝip' apenaŭ albordiĝis,
Juli' el mia brakoten' tordiĝis,
sur kajon saltis kaj kun buba gajo
ekskribis sur la ŝtonojn de la kajo.

Kaj dum miregis ĉiuj pasaĝeroj
li kriis: „Mi ja skribas sur kajeroj!
Kaj ĝin mi faras laŭ principo vera,
ĉar la vorttordo *estas ja libera!*

Tiaj spritaĵoj ĉe Rossetti tute ne estas kabinetaj cerbumaĵoj, sed naskiĝas spontane ankaŭ dum lia ordinara vivo. Foje, ĉe kongreso, oni petis, ke li komentariu silentan turisman filmon; tion li devis fari tutege senprepare, ne antaŭe vidinte la filmon. Montriĝis interalie sporta konkursaro. Ni vidis homon, kiu ĵetis martelegon trans altmetitan laton: Rossetti priskribis „Jen homo, kiu ĵetas martelegon trans laton...."; tuj sekvis bildo de homo, kiu stangosaltis: tute seninterrompe Rossetti daŭrigis, „...kaj jen alia homo postsekvas por repreni ĝin."

Apartan lokon ekster la seriozaj kaj la humuraj poemoj, sed partoprenante la ecojn de ambaŭ, okupas lia *La jubilea eposo.* Temas pri historia skizo pri la Esperanto-movado, mendita por sceneja prezentado ĉe la Bolonja Kongreso en 1955. La fluaj versoj de tiu sukcesega trarigardo preskaŭ kaŝas la artan virtuozecon, kiu ĝin kreis. Pri Zamenhof, ekzemple:

Dum tio, ĉe la Universitato
li studas kun bonega rezultato
la medicinan fakon; sed li trovas,
ke esti kuracisto li ne povas,
ĉar tro kortuŝas lin la suferadoj
kaj agonio de la homofratoj.
Li tial plue studis kun persisto
kaj diplomiĝis kiel okulisto.

Facile farebla? — Provu mem!

Liaj ĉefaj prozaĵoj troviĝas plejparte en la volumo „El la maniko" (1955). Plej sukcese li pentras la malvenkintojn en la vivo, ĉu serioze („La taglibro de Aleksandro Zoffany"), ĉu humure („Francisko la fuŝulo"), kun aparte akra rigardo direktita al la amorvanto kaj amorpoltroneco de la viroj:

Jen, li diris al si, sub tiu maldelikata, haŭtraspa ŝtofo de mia bansurtuto, ŝi surhavas nenion. Post ĉiuj protestegoj kaj montroj de pruda paniko, ŝi — kio? — ŝi sin proponas al mi. Be!

Li glutis malfacile. Li ne sciis kion diri, kion fari. La ekscita aventuro, pri kiu li ofte en soleco revetis, nun trafis lin neatendite, ne reve kaj fore, en kuntuŝa realo. Nun, kiam la okazo venis al lia nazo, li trovis en si nenian emon aŭ povon por la silenta anoncita tagordo.

*

Ĝene ili iris kune al la stacidomo. Du-tri fojojn li faris nervozan, embarasan rimarketon. Ŝi nenion diris.

Li neniam plu revidis ŝin.

Rossetti similas al Ferenc Szilágyi laŭ tio, ke li scias doni al siaj fantaziaĵoj grandan aŭtentikon, tiel ke la leganto de fikciaĵo tamen ĉiam sentas: „Jes, tio ĉi vere okazis".

Tamen, alte super ĉiuj aliaj atingoj de Reto Rossetti triumfas lia tradukarto el la poemoj de la mondkonata skota nacia poeto Robert Burns. Ili estas eĉ pli mirindaj ol lia traduko de la ŝekspira „Otelo" — kiu mem estis la unua matura Ŝekspir-traduko en Esperanto post „Hamleto" far Zamenhof jam en 1894, kaj, pro ĝia fideleco al la teksto kaj la spirito de la originalo, starigis tute novajn normojn por tia traduko. Sed kiel ajn malfacile estas, rekapti la majestan lingvaĵon de la

grandioza angla dramisto, la poemoj de Burns lingve kaj forme prezentas eĉ pli malfacilan problemon. Kaj tiun problemon Rossetti brilege solvis.

Forme, la strofoj de multaj Burnsaj poemoj estas komplikaj. Lia plej ŝatata strofo estas sesversa, kun 4-opa kaj 2-opa rimoj:

La libroj ofte nur mensogas.
Paroloj same veron mokas;
eĉ pastroj iam sin delogas
dum pi-ekstazo
kaj diras, kion ne apogas
la sankta frazo.

Lingve, Burns verkis ĉefe en skota lingvo — supraĵe simila al la angla, sed efektive sufiĉe malsimila. Tiu lingvo, kiel multaj t.n. „dialektoj", estas aparte vigla kaj suke esprimiva, kaj Burns uzis ĝin kun aparta vigleco. Traduki plate tiun lingvaĵon, por doni nur la sencon, estus perfidi la originalon. La talento de Rossetti estis kapabla por io multe pli fidela; por sukaj skotaĵoj li trovis sukajn esperantaĵojn. Kion vi opinias, ekzemple, pri: *ekboardi* (pri la iro de ebrietulo); *kap-pendole* (pri signo de konsento); *Tortuĉjo* (karesnomo por la diablo, kies skota ekvivalento same kunigas intimon kun timo); *susuri sible; riglośova* (priskribas iun kiu kaŝe eniras)? Estas hontinde, ke libroforme ĉi plej elstaraj tradukoj povis aperi nur en multobligitaj kajeroj kaj malgrandegaj eldonkvantoj.

Cetere, la tradukaro de Rossetti prezentos belan taskon al estontaj literatur-esploristoj, ĉar li estas konstanta revizianto, kiu senĉese poluradas siajn verkojn. Kiel redaktoro, mi pli ol unufoje spertis, ke mi ricevadis poŝtkartojn kun revizioj de publikigota verko, ekde la momento de mia akcepto de la verko ĝis — kaj post! — la finpresigo! (Ne tute aprobe, ŝajnas, li plurfoje nomis min „unufojanto"...)

Kompreneble, ankaŭ Rossetti montris sin redaktoro: „33 rakontoj", Angla Antologio", „Esperanto en Skotlando", eĉ „Esperanto" de UEA. Ankaŭ en tiaj taskoj lia skrupula detalemo devigis lin poluradi la kontribuaĵojn, kaj tre multaj verkoj publikigitaj portas la markon de lia senkompara stiltrafo.

Post tiom da laŭdoj, ĉu mi ne havas plendon pri li? Nu — mi ankoraŭ forte bedaŭras, ke li neniam finfaris tiun rektmetodan lernolibron, kiun li siatempe projektis kaj promesis. Aliflanke, lia tuta verkaro estas perfekta supera kurso por ambicia esperantisto. Kaj multe pli.

La titolo estas citaĵo laŭ Rimportreto far Marjorie Boulton.

EL LA VERKARO DE RETO ROSSETTI

EL „OAZO" (1952)

LA VIVOMARO

Peliĝi plu al ĉiam novaj bordoj...
Jen, ni balance buas,
jen, mergo nin detruas,
zefiras jen, nin ŝiras jen la nordoj.

Al horizonto malfermiĝas pordoj,
sed trafi ni malfruas,
ĉar tuj fortrene fluas
la ondoj kiel impetulaj hordoj.

Nin lulas, batas laŭ alternaj sortoj
la mar'; eĉ dum ni ĝuas
la sala flu' nin ruas,
la vivon ronĝas per insidaj mordoj.

Kaj kiam fine mankas al ni fortoj
kaj lukti ni enuas,
sensone tuj ni truas
la akvon sinke al la pacokortoj.

EL „PINTA KRAJONO" (1959)

NACIA LINGVO

Ankaŭ la lingvo estas aŭtokrato.
Al nia nacilingvo ni kutimas
ĝis tia grado, ke l' aŭtoritato

masiva nin blindumas, kaj ni timas
eĉ pensi, ke ĝi povus esti manka.
Ni ne rimarkas, ke nur parto glimas

en mezo de inerta bulo ganga;
ni ne rimarkas la struktur-frenezon
kaj ĝenojn de la labirinto stranga.

Servute, sen protesto, ĝian pezon
ni levas kaj deklaras ĝin leĝera;
ignoras kriplon, disonancon, lezon,

admire pri la lingvo aglomera!

El „El la maniko" (1955)

Paŭlo Pease[1]

Nia arbarista roto prezentis mozaikon de plej diversaj tipoj. Inter la dek ok laboristoj troviĝis anoj de ĉiuj metioj — nur arbaristoj mankis. Sed tie estis eksaj butikisto, kompostisto, barbiro, tapiŝteksisto, profesoro, stukisto, kun diversaj ŝtelĉasistoj kaj nenifaruloj — ĉiuj kunpelitaj per la sorto de milito aŭ la disbombado de iliaj urbaj hejmoj.

Kaj ankaŭ individue ni prezentis interesan sortimenton. La butikisto lamis, la profesoro strabis, la tapiŝteksisto estis ia jehovano kaj unu alia — Dio gardu! — estis eĉ esperantisto.

Tom, la korpulenta, pipfuma, senĝena Tom, estis riĉa karaktero inter ni. Antaŭe li estis ia kuniklo-kaptisto aŭ ŝakristo — oni ne scias precize kio. Li estis sprita estro de pitoreskaj diroj. Kiam iu Andi, al kiu Tom dekomence malsimpatiis, akceptis por mizera pagaltigo de unu soldo ĉiuhore kontroli la aliajn laboristojn, Tom ekkraĉis kaj komentis: „Ja, kion oni povas atendi de bova postaĵo krom fekoj?" Kaj al la studento, kiu foje alvenis ĉe la laborloko en la arbaro, forgesinte sian hakilon, li bonanime pikis: „Verŝajne vi ankaŭ venus en bordelon sen la ilo, amiketo?"

Ni opiniis nin feliĉaj havante inter ni Ĵak, la barbiron. Per li ni efektive sentis nin fieraj kaj favorataj. Nia barakaro ja sidis en la monta kamparo, dudek mejlojn for de la plej proksima urbo, kaj kiel ni estus sukcesintaj nin frizi sen la bonŝanca ĉeesto de la barbiro, mi ne scias. Dank' al li ni troviĝis ĉiam dece pritonditaj, tiel, ke ni tute ne bezonis honti, se iu urbano (aŭ pli grave — urbanino) ekvolis nin viziti. Nur pri unu membro de nia roto ni estis en ioma embaraso. Se iam vizitanto ekvidis iun flankumantan fi-

---

[1] *Elp.* Piiz.

guron kaj demandis: „Kiu estas tiu vila vagabondo inter vi?" — tiam ni aŭ honte malkonfesis nian kamaradon, dirante: „Ho, ia ĉifona vagulo — tiaj ofte trapasas" aŭ ni sincere klarigis: „Pardonu, tio estas nia barbiro. Kvankam li orde pritondas la tutan roton, ni ankoraŭ trovis neniun, kiu barbirus la barbiron!"

Sed verŝajne la plej kurioza tipo el ĉiuj estis Paŭlo Pease, la kamionisto. Kio li estis antaŭe, neniu sciis, sed la famo cirkulis, ke li estas la ekscentra kaj malagnoskita filo de bonranga familio. Almenaŭ mi mem konstatis, ke iom ekscentra li certe estas!

Jam lia aspekto tion supozigis. Sub volba frunto sidis du grandaj, maniaj okuloj en ombro de elstaraj brovostoj. Intere lia karna nazego elarkis pulĉinele, kun aldona tubereto en ĝia mezo — kvazaŭ ridinda nazido ĉe la patrina brusto! Kurta supra lipo, maldika buŝotranĉo kaj granda mentono akcentis la pulĉinelan similecon. Sed sub la timinda aspekto Paŭlo havis la mildecon de leporo.

Li distingis sin tuj en la unua tago. Oni sendis lin preni ŝarĝon ĉe la stacidomo. Tio estis beleta, fiere flegata kampara stacidomo. Florbedoj buntis flanke de la relvojo. En pli larĝa spaco ĉe fino de la kajo staris eleganta fontano en granito, sur kiu gruo kun suprenturnita beko ŝprucigis arĝentajn fadenojn de akvo supren kaj returne en la basenon. Sed la ĉefa belaĵo tie estis verŝajne la laŭba eniro en la stacidomon, formita per du florantaj arboj kunigitaj supre en arko. Nu, Paŭlo decidis, ke li volas enveturi en la stacidomon inverse (verŝajne por eliri rekte kun sia ŝarĝo) kaj ĵetinte rigardon posten, li svingis la gvidradon, komutis akcele kaj — deŝiris komplete unu el la du florarboj!

Ni baldaŭ eksciis, ke Paŭlo estas vegetarano. Sperte ni ekkonis tion, kiam unu tagon li rifuzis preni sur sian kamionon nian viandon, kiu alvenis ĉe la vilaĝo, kvar mejlojn for. Li veturis al ni sen ŝarĝo kaj ni devis atendi ĝis la proksima tago nian viandokvoton.

Tamen ni baldaŭ trovis, ke ĉion oni povas pardoni al Paŭlo Pease. Li tute ne estis malbonintenca, li nur havis *principojn*. Lia vegetarismo estis *principo*. Tial li ne partoprenis la komunan kuiraĵon, sed kuiris por si aparte en propra kaserolo. Kaj al neniu li pruntis sian kaserolon, se temis pri kuiro de viando aŭ de io eĉ iomete infektita de viando. Ekzemple li ne donus ĝin por hejto de iom da supo, kiu estis enhavinta oston, eĉ se la osto restis en la granda poto kaj ĉio cetera estis legoma.

Sed kompatinda Paŭlo havis malfacilon kun siaj principoj. Li devis ekzemple porti ledajn botojn, kvankam la ricevo de ledo implicis la mortigon de bovoj, kaj li ne povis rezigni pri margarino, kvankam verŝajne ĝi enhavis bestan grason, nome balenan. Pike mi argumentadis kun li pri tiuj punktoj, sed mi nenion atingis, ĉar se mi trudis al li argumenton nerespondeblan, li abrupte leviĝis de la tablo, paŝis al la pordo de la barako, kraĉis, kaj revenis sidiĝi ĉe la tablo, sen parolo.

Lia principa vegetarismo devenis de lia principa amo al bestoj. Li malamis (principe) la homojn, ĉar ili mortigas por manĝo kaj aliaj celoj la bestojn, sed, en efektivo, li estis tre simpatia, kun plej bonanima rideto, pri kiu aludis jam la duobla vico da sulkoj, kiuj kavigis liajn vangojn. Lia rilato al la rabaj bestoj, kiuj mortigas aliajn bestojn, estis iom nebula — mi neniam povis orientiĝi pri tio, ĉar se mi faris tiuteme embarasan demandon, Paŭlo ĵetis al mi streĉan ekrigardon, leviĝis por ekkraĉi ĉe la pordo kaj revenis sidiĝi sen plua respondo.

Unu tagon li aŭdis, ke iu farmkatino naskis idojn kaj ke la farmisto intencas dronigi ilin. Li terure agitiĝis pri tio, kaj petis nin ĉiujn pri helpo, sed ĝuste pri kia nome helpo, ni ne klare komprenis. Kompreneble se Paŭlo zorgoplene alparolis iun el ni, ni aŭskultis kaj respondis kun severe trudita seriozo; sed poste ni regalis nin reciproke per ia ŝerco. Do fine en ĉi tiu katido-afero Paŭlo devis mem elpaŝi. Ni efektive ne supozis, ke li ion faros, sed ni eraris. Post la laboro li iris en sia malgranda aŭto al la farmdomo kaj elpetis de la farmistedzino la katidojn. Kun ili li veturis dudek mejlojn ĝis la urbo kaj tie, jam en la mallumo, li petadis ĉe apartaj domoj, ĉu la bonkoraj civitanoj ne volus gastigi katidon por ĝin savi de pereo? Sed lia petado ne prosperis kaj fine li sonorigis ĉe kuracisto kaj pagis al li por mortigi la katidojn sendolore sub anestezo. Poste li veturis la dudek mejlojn returne.

Sed malgraŭ ĉio tio, ankaŭ la bestamo de Paŭlo estis nur principa, sed ne kore natura trajto Foje venis al la barakoj vaganta hundo. La viroj bonkore interesiĝis pri la vizitanto, ĵetis al ĝi pecojn da manĝo el siaj teleroj, karesis ĝin malglate sed bonanime. Unu tagon ni vidis, ke la hundo sidiĝis apud Paŭlo sur lia benko dum li manĝis. Paŭlo ŝajne tute ne vidis la hundon, sed rigardis fikse antaŭen, per siaj grandaj, demonecaj okuloj, kaj nur manĝadis. Ke bestamanto povas eĉ ne konscii la kuneston de besto, kiu lin preskaŭ tuŝas, tio ŝajnis al mi stranga. Post oktaga restado la hundo malaperis, vagis plue. Mi demandis al Paŭlo: „Ĉu vi vidis la hundon hodiaŭ?" kaj Paŭlo respondis „Kiun hundon?"

Oni trovas iafoje, ke la personoj saĝe teoriaj pri sociaj problemoj estas aparte naivaj en la socia kontaktado kun la homoj. Tia estis Paŭlo, kaj fariĝis por iuj kamaradoj franda sporteto lin blagi. Unu vesperon post la laboro kaj vespermanĝo kelkaj el ni ripozis en la dormbarako, sidante sur la litoj. Tom duonkuŝis komforte, kun etenditaj kruroj kaj la dika torso apogita ĉe la muro. Kiel kutime, li pipfumis. Ekstere sur la kampo iu ludis buŝharmonikon. Al Dave, kiu sidis iom pli fore de li ol Paŭlo, Tom turnis sincermienan rigardon kaj demandis: „Ĉu vi vidis tiun gurdiston, kiu sidas ĉe la *Mound*-place en Edinburgo? Li havas nek brakojn nek krurojn." Dave tuj rimarkis la absurdon, kaj ĉar la esenco de tia ŝerco estas, ke oni ne lasu sin tenti por fari malsaĝan demandon, li serioze respondis: „Ha, ĉu vere? La kompatinda homo." Sed Paŭlo tuj ekmordis la hokon. „Kiel li povas ludi la gurdon, se li ne havas brakojn aŭ krurojn??" li miris. „Ho" respondis Tom, „li puŝas la anson en sian pugotruon kaj faras transkapiĝojn!"[2] La tuta barako eksplodis per rido, kaj Paŭlo malfrue komprenis, ke oni lin plene blagis. Tamen tio neniom malhelpis, ke la sekvontan fojon li ne falu denove en la kaptilon!

Paŭlo verkis unu libron. Ĝi nomiĝis *Landvojoj kaj Stelopolvo*. Li donis ĝin al mi por lego. Nu, ĝi estis novica afero, fuŝsentimentala, sed ĉar Paŭlo evidente fieris ĝin, mi ne riskis diri mian detalan opinion. Li poste konfidencis al mi, ke li intencas verki novan de travivaĵoj, kaj laŭ lia peto mi skizis lian portreton por aperigo kontraŭ la titolpaĝo. La portreto bone plaĉis al Paŭlo — mi akcentis liajn ardajn okulojn kaj flate forigis la tubereton de la pulĉinela nazo.

Baldaŭ poste mi foriris de la barakejo kaj de tiam mi nenion plu aŭdis pri Paŭlo Pease. Kaj nun fine mi distras min, skribante pri li.

Ĉu li jam sin venĝis, priskribinte min en sia dua libro?

---

[2] Transkapiĝo: *Salto, ĉe kiu oni cirkle renversiĝas en aero;* salto mortale.

Diamanta Libro de la Esperanto-Movado



Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo. Verkita de Ivo Lapenna (ĉefredaktoro), Ulrich Lins (redaktoro) kaj Tazio Carlevaro. London—Rotterdam, 1974. Eld.: CED—UEA. 842 p., 20×14 cm. Ilustrita. Plaste bindita. Prezo: 84, — ned. gld.

La memkono estas tre utila, oni povus diri, nemalhavebla trajto de la individuo, tamen, individuoj relative bone povas vivi sen ĝi. Manko de nacia memkono jam alportis multajn tragediojn, sed la plej fortaj nacioj transvivis la krizojn kaj floras. Tamen, post la tragedioj ili ĉiuj ekstudis sian historion, objektive pesis siajn atingaĵojn kaj malsukcesojn, tiris la konkludojn kaj konstruis planojn por la estonto surbaze de tiuj konkludoj. Ĝuste tial ili floras. Kono de la propraj tradicioj estas multoble pli grava por la esperantistaro, komunumo nemezureble pli malforta ol la historiaj nacioj; manko de tiaj konoj povas kaŭzi malrapidiĝon de la evoluo, stagnadon, kaj fine neniiĝon.

La deziro kolekti la kulturan kaj movadan tradicion de la Internacia Lingvo naskiĝis tre frue, kaj la tiukampa aktivado de la esperantologoj jam donis kelkajn belajn rezultojn. Inter tiuj rezultoj elstaras la duvoluma *Enciklopedio de Esperanto* el la jaro 1933—35, la *Ora Libro de la Esperanto-Movado* el 1937 kaj *La Internacia Lingvo* el 1954. Sed la tempo pasis, kaj amaso da novaj eventoj, sukcesoj kaj malsukcesoj riĉigis la varian historion de la Esperanto-movado. Kaj nun plenumiĝis la delonga revo de esperantologoj kaj propagandistoj, movadaj gvidentoj kaj kulturamantoj, legemuloj kaj ĉiuj esperantistoj: ni havas — kun kelka malfruo — nian „diamantan" libron, kiu resumas praktike ĉion, kio estas scinda pri la Internacia Lingvo.

Antaŭ ol trakti detale la libron, estu permesate klini la kapon antaŭ la persista laboro de la tri verkintoj: Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. Ili laboris helpataj de pluraj dekoj da diverslandaj kunlaborantoj, kaj oni povas imagi, kiom da ŝvito kaŭzis jam sole la organizo de la laboro. Tamen, tion la leganto kaj konsultanto de la libro ne rimarkas. Li perceptas nur tion, ke la akumulita ega informo-monto estas preciza, kompleta, kaj ne laste: bonege redaktita. Iom familiariĝinte kun la dividprincipoj oni povas trovi dum sekundoj iun ajn bezonatan informon. Detala enhavtabelo, indekso de personoj kaj aparta indekso de temoj helpas la rapidan orientiĝon.

La libro estas dividita je ses partoj, dudek tri ĉapitroj kaj multnombraj logike faritaj subĉapitroj. Por gustumo ni citu la titolon de la ses (ne egale longaj) partoj: *Esperanto kiel solvo de la lingva demando en mondaj kadroj; Literaturo; En la servo de kulturaj interŝanĝoj, praktikaj celoj kaj internacia solidareco; Historio kaj nuntempa organizo de la Esperanto-movado; Aktoj kaj apogoj; Perspektivoj por la estonteco.* Ĉisube mi provos prezenti kelkvorte la unuan, duan kaj kvaran partojn, kiuj probable havos la plej multajn legantojn.

La *unua* parto pritraktas el pluraj aspektoj la lingvan problemon en internaciaj rilatoj, poste analizas la kapablojn de Esperanto, ĉu ĝi taŭgas por solvi tiun problemon. La analizon sekvas baza prezento de la esperanta kulturo kaj raporto (historia kaj sinkrona) pri la instruado de la Internacia Lingvo. Mi menciu ĉi tie unu el la ĉefaj virtoj de la libro: ĝi neniam prezentas informojn dubvalorajn, sed okaze de nescio sincere konfesas: *informoj mankas.* Tiu sinteno forblovas multajn blufojn ankaŭ koncerne la instruadon de Esperanto.

La *dua* parto komenciĝas per koncizaj karakterizoj de la esperanta literaturo, poste sekvas la pritrakto de la originala literaturo, de la komenco ĝis 1972. La vortŝpara prezento (entute malpli ol 70 paĝoj) ne lasas lokon por longaj analizoj, tamen, duonfrazaj komentoj bone orientas la legantojn, kaj neniu grava valoro estas preteratentita. El la ĉapitro *Traduka Literaturo* elstaras la valorega subĉapitro „Esperanto kiel pontolingvo". Atestas pri bona kono de la materialo ankaŭ la prezento de la fakaj verkoj, sed oni volonte vidus iom pli ampleksan kaj profundan ĉapitron pri la periodaĵoj, kiuj ĝis nun estis — kaj verŝajne ankoraŭ longe restos — la ĉefa kolono de la esperanta kulturo.

La *kvaran* parton enkondukas ĉapitro pri la formiĝo de la ideo de monda organizaĵo por Esperanto, kaj, pritraktas ties agadon ĝis 1947. La sekva ĉapitro prezentas la landajn movadojn (aperas bone farita artikolo ankaŭ pri la hungara), post kio oni povas legi pri la fakaj organizaĵoj kaj TEJO. La ĉapitro 18 estas dediĉita al la konigo de UEA inter 1948—1973. Ĝin sekvas ĉapitro pri la historio de la laborista Esperanto-movado, kaj tre interesa kaj informriĉa pritrakto de la institucioj de la movado (Akademio, CED ktp.).

Kompreneble la tria, kvina kaj sesa partoj ne estas malpli interesaj, precipe la kvina, kiu en la temo de la persekutoj verŝajne vekos ankaŭ diskutojn. Same diskutinda estas la sesa parto, kiu pritraktas la estonton, sed tio estas natura afero: kiu ja povus doni al ni certamane la oran ŝlosilon de la sukceso?

Ĉiukaze, ni utiligu tiun ĉi unikan libron por la propra eduko, por la plibonigo de nia agado, por plua scienca laboro (taŭga bibliografio helpas la esploristojn), kaj ne laste, por la pliseriozigo de la nacilingva informado. Mi konsilas al ĉiu grupo kaj serioza individuo akiri ĝin malgraŭ la vere spirhaltiga prezo. Laŭ peto de pluraj legantoj verŝajne ankaŭ urbaj bibliotekoj pretos ĝin aĉeti.

Vilmos BENCZIK

MICHELANGELO BUONARROTI

SONETO

Ne estas eĉ plej arta rev' el ŝtono,
kiun ne fermus marmor-ekzemplero
en sia troo; ĝin nur trovas fero
gvidata skulpte per inspir' kaj kono.

Timata mavo, esperata bono
vin loĝas, dam' pompanta en fiero,
sed vane penas mi kun malespero
doni la art-efekton laŭ bezono.

Nek amo kulpas do, nek via belo,
nek duro, fat', malŝato malafabla
pri mia plago, nek destin' aŭ sorto;

samtempe ja indulg' kaj mortkruelo
nestas en vi, sed mi, kun nekapabla,
ardanta cerbo trafas nur al morto.

El la itala: L. TÁRKONY

Al la giganto de la arthistorio, je la 500-a datreveno de lia naskiĝo, ni omaĝas per ĉi tiu traduko de lia soneto.

Kalendaro

1945—05—02 Antaŭ 30 jaroj Berlinon okupis la sovetaj taĉmentoj.

1945—05—08 Antaŭ 30 jaroj kapitulacis senkondiĉe la Hitlerista Germanio.

1945—05—09 Antaŭ 30 jaroj finiĝis la milito en Eŭropo. Ĉi tiu tago estas la „Tago de la Venko".

1930—05—09 Antaŭ 40 jaroj naskiĝis Edvin de KOCK, sudafrika esperantista poeto. (Vidu HV. 69/3.)

1880—06—01 Antaŭ 95 jaroj naskiĝis Margit KAFFKA, hungara verkistino, poetino.

1625—06—10 Antaŭ 350 jaroj naskiĝis János APÁCZAI-CSERE, hungara filozofo, profesoro kaj pedagogia verkisto.

1835—06—26 Antaŭ 140 jaroj naskiĝis Ottó HERMAN, hungara natursciencullo, etnografo kaj polihistoro. (Vidu HV. 65/2.)

1850—07—09 Antaŭ 125 jaroj naskiĝis Ivan VAZOV, bulgara verkisto. Liaj verkaĵoj estas konataj ankaŭ per bonaj E-tradukoj.

1945—07—12 Antaŭ 30 jaroj estis aranĝita en Hungario la unua libera „Tago de Libro". Por la festo aperis 56 diversaj volumoj.

1860—07—16 Antaŭ 115 jaroj naskiĝis Felicien MENU DE MÉNIL, franca komponisto de la muziko de nia Himno.

Komp. L. RIETH

Lingvo kaj logiko

Estimata sinjoro Mimó! Je mia recenzo, aperinta sub la supra titolo pri via gramatika libro, vi reagis per longa letero. Ni ĝoje publikigus ĝin, se vi pridiskutus kaj precipe se vi refutus la recenzon, sed tion vi ne faras, vi simple insiste ripetas viajn tezojn erarajn. El tio mi devas konkludi, ke vi ne komprenis miajn vortojn. Tial mi nun klopodos skribi kiel eble plej klare.

1. Vi protestas kontraŭ tiu mia aserto, ke al vi mankas la *ĝusta mezuro.* Sed ĉu ne pruvas tion, ke laŭ vi oni devus trakorekti la tekstojn de ĉiuj E-aj klasikuloj konforme al la reguloj de vi starigitaj?

2. Vi akuzas min per tiklemo, ĉar mi montris, ke vi, obsedito de logiko, faras logikajn erarojn. Sed tion mi pruvis ja! Ekz-e, vi deklaras kiel *senesceptan* regulon, ke post prepozicio ne povas stari infinitivo. Poste vi diras, ke „por", „anstataŭ", „krom" kaj „malgraŭ" *ne estas esceptoj,* kvankam ilin povas sekvi infinitivo, ĉar ili povas funkcii ankaŭ subjunkcie (konjunkcie). Nun ni vidu la erarojn.

2. a) Ankaŭ la dufunkcieco de tiuj prepozicioj estas *escepto* (se ĝi ekzistas), ĉar ne ĉiuj prepozicioj estas dufunkciaj. Logika eraro estas demonstri la senesceptecon de E-o tiel, ke unu esceptecon oni volas elimini per alia escepteco.

2. b) Tiuj kvar prepozicioj eĉ *ne estas dufunkciaj,* kaj tion, en alia momento, vi ankaŭ plene rekonas, tiom ke vi malpermesas eĉ la (zamenhofajn) formojn „anstataŭ ke . . .", „malgraŭ ke . . ." kaj postulas „anstataŭ tio ke . . .", „malgraŭ tio ke . . .". Sed se tiuj prepozicioj povus funkcii subjunkcie, ankaŭ „ke" estus superflua post ili.

2. c) Du prepozicioj, *ĝis* kaj *dum,* vere funkcias ankaŭ subjunkcie, tamen, post ili ne povas stari infinitivo. Sekve, subjunkcia funkcio de prepozicio ne estas kriterio por tio, ke post ĝi povu stari infinitivo. Tion vi preteratentis.

2. d) Vi skribas: „Erare estas, ke tiuj prepozicioj ne povas funkcii konjunkcie. Tiel ili funkcias en la zamenhofaj ‚Vi babilas anstataŭ manĝi' kaj ‚Vi nenion povas fari krom kunbati viajn dentojn'." La „subjunkcia funkcio" do laŭ vi signifas: „post ĝi povas stari infinitivo". Tiuj du ebloj estas egalvaloraj, do reciproke anstataŭigeblaj. Via regulo, sekve, tekstos: „Infinitivo neniam povas stari post prepozicio. *Anstataŭ, krom, malgraŭ* kaj *por* ne estas esceptoj, *ĉar* post ili povas stari infinitivo." Ĉi tiun logikan eraron, jam eĉ komikan, mi ne scias kiel nomi; ĝi estas pli ol „hysteron proteron".

Mi ne volas ĉi tie listigi ĉiuj viajn strangaĵojn, ekz-e, ke „ekzemple" estas malĝusta anstataŭ „por ekzemplo"; ke anstataŭ „unu la alian" oni devas diri „reciproke" (do korekti la poemon „La espero" de Zamenhof); ke anstataŭ „sindone" oni devas uzi „si-done". Mi atentigas nur, ke maturiĝintan lingvon ne licas tiel perforti. Tio povas kaŭzi nome la danĝeron, ke el la fidelaj studantoj de via lernolibro formiĝos sekto, kiu parolos alian E-on ol la cetera E-a mondo.

K. KALOCSAY

Paŝo senerara



Ni citas la finajn versojn el la poemo „Ne ... ne ..." de K. Kalocsay.

Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 1-a de julio. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj: 1. Unua vico de la citaĵo. Daŭrigo estas en la vicoj 1. kaj 15. vertikalaj kaj 30. horizontala. 13. Parolante pri ekzistaĵo, proprigi al sia substanco alian sorbitan substancon (Radiko). 14. Substanco supozita simpla, kaj konsistanta el samsubstancaj eroj. 16. Faras, ke io estu sur difinita loko (R). 17. Anĝelo de la abismo. 18. Numeralon. 19. Eŭropa ĉefurbo laŭ originala ortografio. 20. ŜA. 21. Nomo de cifero (R). 22. La muzo de la ampoezio. 23. Optika nocio (R). 25. Speco de kvarrada rusa veturilo, fiakro. 27. Japana pruno. 29. Aviadila manovro (R). 31. Konjunkcio. 32. Transversa ŝtono aŭ trabo, formanta la bazon de pordaperturo (R). 33. Radiumo. 35. Sufikso. 36. Reen: apartenas al vi. 37. Astateno. 38. Adverbo. 39. Maldolĉa por la gusto (R). 41. Samaj konsonantoj. 44. Iri de unu loko en alian sen difinita celo (R). 45. Turnodanco rapida laŭ tritakta ritmo (R). 47. Kovru ĝin per papero kaj poste ligu per ŝnuro! 49. Muzika verko kreita por ekzercoj. 51. Aparteniĝo. 53. Reen: la ekstrema parto de la brako (R). 54. Konjunkcio. 55. Apudmara urbo en Peruo, sude de la ĉefurbo Limo (CHALA). 56. 1551 — per romiaj ciferoj. 57. Reesperigo per afablaj kuraĝigaj paroloj por mildigi ies ĉagrenon. 59. Ne hejmigita au kultivata (R). 60. Versa verko apartenanta al vi kaj al mi (du vortoj). 62. Tegaĵo etendita sur la grundo de strato.

Vertikalaj vicoj: 2. Sekurigo kontraŭ riskoj (R). 3. Diros al iu Via Moŝto. 4. Eliĝi nevideble, plej ofte parole pri gasoj kaj radio (R). 5. Prefikso. 6. Samspecaj literoj de peli. 7. Peto pri indulgo (du vortoj). 8. Sin fordona al io. 9. Inklino. 10. Mordilo. 11. Aliĝinto. 12. Mezo de osto! 17. Genro de grandaj Amerikaj papagoj kun plumoj de viva koloro (R). 19. Komenco de la protokolo! 20. Piedvestaĵojn. 22. Komenco de la marŝo (R). 23. FO. 24. Fino de soklo! 26. Kolekti monon, dank' al modera elspezo (R). 28. Prepozicio. 32. Interjekcio por haltigi. 34. Korfavorato. 37. Pli-malpli ruĝa ŝvelaĵeto sur la haŭto. 40. Faru ion! 41. Artikolo. 42. Rilata al blanka vintra falaĵo. 43. Manĝaĵo, konsistanta el ia nutraĵo metita inter du pantranĉoj (R). 45. Vanado kaj oksigeno. 46. Vetkurado de skiantoj sur malsuprenira deklivo, kiun artefaritaj obstakloj faras tre zigzaga (R). 48. Kano, uzita de la antikvuloj por skribi sur papiruso. 50. Du personoj. 52. Instrumento. 55. Granda pedagogo de Esperanto, aplikanta rektan metodon (Andreo, 1895). 56. Transigi objekton en alian lokon. 57. Kiel? — ruse (KAK). 58. Reen: aŭdebla aervibrado (R). 59. Sen tiu la nutraĵo estas sengusta (R). 61. Finaĵo de la paseo. 62. PE.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 74/6 estas:
SURSKRIBU POR ETERNA ATESTO KAJ INSTRU':
SUPRE LA ŜIP' SITUAS.
LA AKVO SUBE FLUAS,
SED ESTRAS JA LA FLU'!

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 75/1 estas:
„Sur la kontinenta nigra sino
Pezas ŝarĝ' de konscienco kaj destino."

Libropremion gajnis: Vladimir Ebel, 656099 BARNAUL—99, abon. k. 83, USSR; Weinber Ildikó, 1126 Budapest, Kiss J. alt. u. 30/b; Bíró József, 4029 Debrecen, Bercsényi u. 33.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Nia literatura enigmo ĉi-numere kaŝas nomon de besto ne tro simpatia, tamen espereble tio ne fortimigos niajn legantojn. Trovinte la ĝustan respondon al la kvar demandoj ĉi-sube, oni ricevas kvar nomojn. La komencliteroj de la kvar nomoj — en certa vico — formas la nomon de la besto. *Oni alsendu nur la nomon de la koncerna besto.*

1. Pola verkistino, kies romanon esperantigis mem Zamenhof.

2. Esperantista aŭtoro (nask. en 1924), al kiu Kalocsay adresis longan leteron en versoj.

3. Brita esperantista verkisto, kies familia nomo tamen memorigas pri pli sudaj regionoj.

4. Dana esperantista scienculo, kiu verŝajne tre simpatias kun la bestoj.

Limtempo de la alsendo: 1975—07—31

Solvo de la enigmo el la numero 6/1974:

1. Johan Hammond Rosbach

2. Antoni Grabowski kaj Petrarca.

3. Sen Paraŝuto (Poemaro de Poul Thorsen).

Libropremion gajnis: Jindřich Tomišek, 751 18 Řikovice 67, okres Přerov, Ĉeĥoslovakio, kaj Tibor Papp, 4031 Debrecen, Trombitás u. 12., Hungario.

Korespondi deziras

El Bulgario:

S-ro St. CANKOV, str. Balgarska —5, 7006 RUSE, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn nur kun esperantistoj en la tuta mondo laŭ nominalo.

El Ĉeĥoslovakio:

S-ro Kroulik ZDENO, 900 61 GAJARY, pri ĉiuj temoj.

El Germana Demokratia Respubliko:

S-ro Karl MOSER, Puschkinstr. 29, 213 PRENZLAU, 72-jara muzikinstruisto.

S-rino Sighilt OTTO, Enzmannstr. 13, 90 KARL MARX STADT, 28-jara oficistino.

S-ro Torsten WAESE, Str. d. Einheit 25 E, 943 SCHWARZENBERG, 16-jara studento.

S-ro Peter LORENZ, Schneebergerstr 12, 943 SCHWARZENBERG, 20-jara studento.

S-ro Richard PARYS, Alte Annabergerstr. 37, 943 SCHWARZENBERG, 20-jara studento.

S-ro Arthur BAUMGART, Behringstr. 33, 86 BAUTZEN / SA, 68-jara rentulo.

S-rino Margarete WEBER, Uhlandstr. 7, 1502 BABELSBERG, 46-jara oficistino.

S-ro Edgar MÖLLER, Dr. Hans Wolf str. 24, 27 SCHWERIN, 31-jara laboristo. Interŝanĝus bildkartojn, E-revuojn. Interesiĝas pri turismo kaj folkloro.

Barbara SCHULZE, DDR 1106 Berlin, Fontanestr. 78 (35-jara ekonomiistino) deziras kor. kun t.m. pri literaturo, arto, vojagado.

El Hungario:

S-ro Sándor SCHLER, str. Nyár u. 82/A, 1045 BUDAPEST IV, 21-jara studento. Pri lingvolernado, politiko, sporto kaj moderna muziko.

S-ro József PIROSKA, str. Móra Ferenc u. 17, 6100 KISKUNFÉLEGYHÁZA, 30-jara aŭto-muntisto pri turismo, kolekto de bk.-oj.

S-rino Elizabeta GÉCZI, 2146 MOGYORÓD, instruistino pri muziko, turismo.

Junaj geedzoj Balázs TELEK, I. kerület 52, 2713 CSEMŐ, kun junaj esperantistaj geedzoj el la tuta mondo.

F-ino Ilona LÓRÁNT, str. Palota út 56. 3517 MISKOLC, 19-jara studentino de pedagogia ĉeflernejo pri kolekto de bildkartoj kaj poŝtmarkoj, pri legaĵoj, muziko kaj filmarto.

12—14 jaraj gelernantoj kun gejunuloj de landoj Afrikaj, el Anglio, Finnlando, Francio, Kanado kaj Kubo. Oni skribu al la adreso de instruisto S-ro András ZOCSKÁR, str. Ady u. 144. 7001 SÁRBOGÁRD.

El Pollando:

S-ro Krzysztof NOWAK, ul. Reymonta 22 D/4. 46—100 NAMYSŁÓW, 17-jara studento pri filmoj kaj aŭtoj.

Studenta Esperanto-Klubo ĉe Agrikultura Akademio en Wrocław deziras kunlabori kun similaj kluboj de agrikultura aŭ veterinara fakultatoj. Bonvolu skribi al adreso: SE—K, A. A. str. Norwida 25. 50—375 WROCŁAW.

El Sovetunio:

Junulinoj kaj junuloj, komencantaj kaj progresantaj geesperantistoj, gestudentoj de universitato, estontaj: juristoj, biologistoj, kemikistoj, matematikistoj kaj fizikistoj. Kun ĉiu lando pri ĉiu temo. Respondo kaj korespondamiko estas garantiataj. Nia komuna adreso: K.I.A. — E-sekcio, 660075 — KRASNOJARSK p/k 2420.

Humuro

Deviga situacio. Operkantisto staras antaŭ tribunalo kiel atestanto. La juĝisto demandas lin pri liaj indikoj, interalie:

— Via profesio?

— Mi estas la plej granda operkantisto de la mondo.

— Hm — surpriziĝas la juĝisto malagrable —, ĉu vi ĉiam fanfaronas tiamaniere?

— Ho ne — respondas la kantisto —, mi estas ordinare tre modesta homo. Sed, kion fari, mi nun metas konfeson sub ĵuro.

Repliko. G. K. Chesterton kaj G. B. Shaw, la unua tre dika, la alia tre malgrasa homo, ofte ĉikanis unu la alian.

— Vidante vin, — diris Chesterton foje al Shaw —, oni pensus, ke en Britlando estas malsatmizero.

— Kaj vidante vin, — respondis Shaw —, oni pensus, ke tiun malsatmizeron kaŭzas vi.

Boneco. Milionulo, ne elektema en siaj rimedoj de riĉiĝo havis unu okulon el vitro kaj tre fieris pri tio, ke tiu vitra okulo estas perfektega, tiel ke oni ne povas ĝin distingi de la vera. Li ofte demandis siajn gastojn, kiu el liaj du okuloj estas el vitro, kaj estis tre feliĉa, se la demandito maltrafis. Foje li metis la demandon al Walt Whitman:

— Nu, kiu mia okulo estas el vitro?

— La maldekstra — respondis Whitman.

— Ha, vi trafis! — diris la milionulo. — Per kio vi divenis tion?

— Nu, — diris la poeto —, en tiu okulo vidiĝas iom da boneco.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1975. 3-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: K. Kalocsay
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, László Rieth, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Rózsa Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaki-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poĉtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Eksterlande disvastigas „KULTÚRA" Eksterlandkomerca Entrepreno por Libroj kaj Gazetoj — 1389 Budapest, Pf. 149. Abonprezo por eksterlandanoj jare 6 Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto.

75.4390 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: *25.377*

LEHEL

MODERNA MASTRUMADO

MODERNA FRIDUJO

Fabrikanto: FRIDUJFABRIKO

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I. Hess András tér 3
Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság útja 27